

LA VOJO AL NIRVANO

aŭ la Dhammapado

tradukita de T.T. Anuruddha

ENKONDUKO

Jen ni prezentas la duan libron en Esperanto de la Bô-tât-Csoma-Instituto por Budhologio apud Vŭng Tàu en Suda Vjetnamio. La nuna libro estas unu el la plej konataj inter budhanoj de ĉiuj skoloj kaj sektoj. "La Vojo al Nirvano" estas la Dhammapado, apartenanta al la Tripitako, la tri kolektoj de sanktaj skribaĵoj en la lingvoj Pāli kaj Sanskrito. Ambaŭ Sanskrito kaj Pali estas kvazaŭ-mortintaj lingvoj, kvankam aro da brahmanoj ankoraŭ parolas Sanskriton, kaj budhanaj monaĥoj en Cejlono, Tajlando, Kamboĝo, Laoso, kaj parte en Vjetnamio povas parkere citi en Pali la Sutrojn (prelegojn) de la Budho, inkluzive la Dhammapadon. Inter la anoj de la norda skolo de Budhismo, la t.n. Mahajano (la "granda veturilo" al saviĝo) ekzistas la Udanavargo (versoj de solenaj diraĵoj), kiu konsistas el pli ol 500 versoj aŭ stancoj, kiuj plejparte ankaŭ troviĝas en la palia Dhammapado. Laŭ mia scio, la Udanavargo ekzistas en nur unu traduko, en la angla lingvo, kaj neniam fariĝis tiom populara kiom la palia Dhammapado.

La Dhammapado aŭ "Vojo al Nirvano" estas resumo de solenaj diraĵoj de Gotama Budho, elĉerpitaj el ties prelegoj. Laŭ tradicio, la Altestimata Ŝariputro iam recitis la 423 versojn en la ĉeesto de la Budho kaj ties disĉiploj; post la recito la Budho aplaŭdis kaj aprobis ilin kiel siajn aŭtentajn vortojn. En antikva tempo, budhanaj monaĥoj parkere lernis la Tripitakon, kaj kelkaj inter ili faras tiel ankoraŭ hodiaŭ.

Pli frua traduko de la Dhammapado estis farita el la angla lingvo de la budhana esperantisto S-ro George Yoxon; ĝi aperis serie en "La Budhismo" inter la jaroj 1930-1936. En la posta organo de la Budhana Ligo Esperantista, "La Budha Lumo", aperis parte serio de versoj tradukitaj el Pali de D-ro V. Sadler, la nuna direktoro de la centra oficejo de U.E.A. Mia propra traduko estas rekte el la lingvo Pali; mi ne konsultis aliajn esperantajn tradukojn, kiuj ne estis je mia dispono. Tamen, mi iom profitis de du anglalingvaj tradukoj. La unua estas la pionira traduko de Profesoro F. Max Müller, en volumo 2 de "Sacred Books of the East", kaj la dua estas la traduko de Nārada Thera el Cejlono, en ties majstra traduko eldonita en Sajgono en 1963. Tiu traduko de la Dhammapado estas laŭ mia konvinko la plej bona ekzistanta en la angla lingvo. La Dhammapado estas tradukita en multajn eŭropajn lingvojn, i.a., en la germanan, la italan, la latinan, la finnan, la svedan, kaj la rusan.

Ĝis nun la Dhammapado ne troviĝis en libro-formo en Esperanto; pro tio ni decidis eldoni ĝin tiuforme kiel eble plej baldaŭ. En nia unua libreto, "Tiel

Parolis la Budho kaj liaj Disĉiploj", eldonita dum 1971, mi prezentis kelkajn versojn el la Dhammapado, kiuj en la nuna libro iom malsimilas. En la unua libro mi ofte tradukis la versojn nur laŭ la senco kaj ne tro laŭlitere, sed en tiu ĉi speciala eldono de la tuta Dhammapado mi kiel eble plej fidele tradukis, eĉ je kosto de ritmo kaj versbeleco, ĉar la ĉefa celo estas ne belsona versaro, sed disvastigo de la Dharmo (Budhismo). La Dhammapado apartenas al tiuj instrulibro, kiujn oni nepre devas relegi de tempo al tempo por kapti la veran signifon de la verkoj. La Dhammapado estas bonega helpilo kaj gvidilo por la ĉiutaga aŭ ĉiunokta meditado, ĉu oni estas monaĥo aŭ ne. Ankaŭ ne-budhanoj povas profiti de la Dhammapado, ĉar ĝi enhavas nenion, kio kontraŭas la religiajn sentojn de alie-kredantoj.

La titolo de nia eldonaĵo estis elektata kiel tre taŭga, kvankam ĝi ne estas laŭlitera traduko. La palia termino "dhamma" (sanskrite "dharma") havas plurajn signifojn, i.a. "leĝo", "devo", "normo", "religio", kaj "aĵo"; sed budhanoj komprenas per tiu vorto la doktrinion de la Budho, kio estas multe pli ol simpla religio en la ordinara senco de la vorto. Ĝi estas filozofio, vojo de vivo. "Pada" signifas "vojo". Sed ĉar la admonoj, konsiloj, kaj ceteraj diraĵoj de la Beatulo celas montri la vojon al suferliberiĝo kaj al Nirvano, mi pensis, ke speciale la okcidento pli facile komprenus ĉi tiun titolon, ol se mi nur dirus "La Vojo de la Lego", "La Vojo de Religio", aŭ simile. La sanskrita termino "Nirvana" (en Pali "Nibbana") estas jam konata al multaj teozofianoj, kaj al rozkrucanoj kaj aliaj membroj de spiritsciencaj grupoj, societoj, aŭ frataroj. Kvankam multaj personoj konas la vorton Nirvano, egale multaj miskomprenas ĝin; pro tio mi volas aserti, ke Nirvano estas nek iu loko preter la nuboj, "Ĉielo", nek unuiĝo kun Dio aŭ kun ia supozata Superanimo (sanskrite "Paramatman"). En la multaj piednotoj oni trovos klarigojn pri certaj teknikaj terminoj. Ofte mi ripetas la klarigojn, intencante, ke la leganto memoru pli facile la signifojn de la sanskritaj kaj paliaj terminoj. Mi intence evitis trouzon de tiaj fremdlingvaj vortoj, sed la minimuma kvanto ne estas troa ŝarĝo.

Al la legantoj, kiuj ĝis nune ne bone aŭ tute ne konas la Budhon kaj ties doktrinojn, mi volas doni mallongan resumon pri Lia historio kaj doktrino.

Unue, oni sciu, ke la vorto Budho (sanskrite kaj palie "Buddha") estas ne ia persona nomo, sed epiteto, kiu signifas "La Enlumiĝinto". La familia nomo de la lasta Budho estis Gaŭtamo (sanskrite kaj palie "Gotama"), kaj Lia persona nomo estis Siddhartha (palie "Siddhatta"). La patro de Sidharto estis la maharaĝo Sudhodano, kaj la patrino nomiĝis Majadevi'; ili apartenis al la

nordhinda tribo de la Sakjoj. La patrino mortis sep tagojn post nasko de la filo, proksimume 560 jarojn antaŭ Kristo. Princo Sidharto edziĝis je la aĝo de dek ses jaroj kaj havis filon nomatan Rahulo. Tradicio rakontas, de Sidharto estis meditema junulo kaj multe pensadis pri spiritaj kaj mondaj problemoj. Kiam la princo havis dudek naŭ jarojn, li decidis forlasi la hejman vivadon kaj kiel asketulo serĉi la solvon al mizero, sufero, kaj malkontento en la mondo. Preskaŭ sep jaroj da severa asketismo sekvis en la arbaroj ĉirkaŭ la nuna Buddhagajo en Norda Hindio. La iama princo Sidharto emaciĝis ĝis skeleto, sed tiam li subite klare vidis kaj eksciis, ke tiu speco de religia serĉado estas unu el la ekstremaĵoj, kiuj ne kondukos lin al la plej alta celo. La estonta Budho denove prenis siajn manĝojn regule, kaj iom post iom regajnis forton, sanon, kaj bonan aspekton. Libroj rakontas multajn legendojn pri tiu evento kaj aliaj, tro multajn por rakonti ĉi tie; krom tio, ili ne estas gravaj. Dum Plenlumnokto en majo, la Bodhisatvo atingis la plej superan staton, al kiu hinda religiulo povis aspiri: Budhecon — t.e. Enlumiĝo sen helpo de ekstera forto, dio aŭ spirito. La budheco de la iama princo konsistis el la kapableco rememori detale multajn pasintajn vivojn kaj klarvidi la vivojn kaj renaskiĝojn de aliaj personoj, kaj antaŭ ĉio el tio, ke la Budho eltrovis la Kvar Noblajn Verojn pri suferado en la mondo, kiuj mallonge estas: (1) sufero ekzistas en la mondo; neniu povas nei tion; (2) la ĉefaj kaŭzoj de sufero estas avido, malamo, kaj memiluziado; (3) estas eble liberiĝi de sufero; kaj (4) la rimedo, per kiu oni povas liberiĝi, estas la Nobla Okparta Vojo kondukanta al ĉesigo de ĉia speco de sufero, mizero, kaj malkontento, al liberiĝo for de la Rado de Vivo kaj Morto, kaj al akiro de Nirvano.

Ĉi tie mi rekomendas al la leganto, ke tiu studu la Budhisman Katekismen de Subhadra Bikŝuo kaj la aliajn libretojn kaj librojn troveblajn en la librolisto ĉe la fino de tiu ĉi libro.

La Budho misiis en Hindio ĝis sia okdeka jaro, kaj mortis proksime de Kuŝinnaro apud la nuna Nepalio. La paca doktrino de la Budho rapide disvastiĝis tra Hindio, kaj poste tra ĉiuj aliaj aziaj landoj, kaj forte influis la religian kaj kulturan vivon de multaj nacioj. El duonsovaĝaj popoloj ĝi faris pacemajn naciojn kaj fervorajn budhanojn; antaŭ ĉiuj oni devas menciigi la mongolojn kaj tibetanojn. Budhismo ankaŭ penetris la okcidenton pere de la misiistoj senditaj de la granda hinda reĝo Aŝoko. Sed la posta militema roma ŝtatreligio subpremis ĉiujn aliajn religiojn — konsekvence, ankaŭ la budhismajn sektojn.

Estas nia espero, ke Dhammapado inspiru multajn al plua studado de Budhismo, kaj ke ili trovu en ĝi vivvojon, kiu malgraŭ ties antikveco estas tre aktuala kaj en plena konsento kun la eltrovoj de moderna scienco; neniu alia religio povas fronti sciencon sen ŝanĝi siajn ideojn pri la evoluo (ne kreo) de la universo kaj pri ĉio, kio ekzistas en ĝi.

Kelkajn vortojn mi volas aldoni pri la uzita ortografio por sanskritaj kaj paliaj terminoj. Ĝis nun ne ekzistas unuanima interkonsento pri la prava transskribo de tiaj terminoj; pro tio mi decidis uzi mian propran transskribmanieron. Mi lasas la terminojn sen troa ŝanĝo, tial ke oni povu rekoni ilin, sed anstataŭ "y" mi uzas "j", kaj escepte la esperantajn supersignojn mi ne uzas la diakritikajn signojn. Vortojn kiel "Dharmo", "Bhikŝuo", kaj "Budho" mi skribas kun la "h" por indiki, ke temas pri fremdlingva termino, parte ne trovebla en esperantaj vortaroj.

Je la fino de tiu ĉi enkonduko mi devas ne forgesi publike danki S-ron John Stanley el Merced, Kalifornio, kiu bonvole konsentis tralegi, korekti, kaj retajpi la manuskripton; mi estas certa, ke nia samideano faris bonegan laboron.

Dankon ankaŭ al Prof. Francisko Simonnet kaj al s-ro Nguyễn phước-Kháng el Sajgono, kiuj transprenis la taskon serĉi taŭgan presiston kaj kon-troli la laboron.

Oni bonvolu pardoni eventualajn prezerarojn pro la fakto, ke la presisto ne scias Esperanton.

Listo pri bona budhisma literaturo en diversaj lingvoj estas aldonata.

Vũng-Tàu
la 1-an de januaro 1973

D-ro T.T.Anuruddha
Direktoro
de la Instituto

Ĉapitro 1

Jamaka Vagga

La Ĝemelversoj

1. Ĉio, kio ni estas, estas la rezulto de tio, kion ni pensis : ĝi estas fondita sur niaj pensoj; ĝi estas farita el niaj pensoj. Se homo parolas aŭ agas kun malbona penso, sufero sekvas lin kiel la rado sekvas la piedojn de ĉar-tiranta bovo.
2. Ĉio, kio ni estas, estas la rezulto de tio, kion ni pensis : ĝi estas fondita sur niaj pensoj; ĝi estas farita el niaj pensoj. Se homo parolas aŭ agas kun bona penso, feliĉo sekvas lin kiel la ombro, kiu neniam forlasas lin.
3. "Li insultis min; li batis min; li venkis min; li prirabis min" — en homo, kiu tiel pensas, malamo neniam ĉesos.
4. "Li insultis min; li batis min; li venkis min; li prirabis min" — en homo, kiu ne tiel pensas, malamo ĉesos.
5. Malamo neniam ĉesos pro malamo en tiu ĉi mondo; sole pro amema bonvolo malamo ĉesos. Tio estas eterna leĝo.
6. La kverelemuloj ne scias, ke oni povas pereji en tiaj kvereloj; sed inter ili tiuj, kiuj komprenas tion, pacigas la kverelojn.
7. Tiu, kiu vivas serĉante nur plezurojn, kun ne-regitaj pensoj, avide al manĝoj, mallaboreme kaj senenergie — tiun Mara'¹ certe faligos, kiel vento faligas malfortan arbon.
8. Tiu, kiu vivas ne serĉante plezurojn de la sensoj, kun bone regita menso, malavide al manĝoj, fidele kaj energie — tiun Mara' certe ne povos faligi, kiel la vento ne povas faligi rokan montaron.
9. Tiu, kiu volas vestiĝi en la flava robo sen antaŭa sinpurigo de ĉiuj makuloj, sen mem-rego kaj vero, ne indas la flavan robon².

¹ Mara' estas la hindua personigo de Morto kaj Malbono.

² La flava robo estas la vesto de budhanaj monaĥoj, kaj konsistas el la robo mem, subvestaĵo, kaj pantalono (por la Mahajana-aj monaĥoj; la Theravada-aj monaĥoj vindas flavan tukon ĉirkaŭ la koksojn). Sed la koloro kaj formo de la robo multe ŝanĝiĝis post la tempo de la Budho.

10. Tiu, kiu sinpurigis de ĉiuj makuloj, kaj estas bone fondita sur la virtoj, havante mem-regon kaj veron — tiu vere indas la flavan robon.
11. En la ne-esenca ili vidas la esencan, kaj en la esenca ili vidas la ne-esencan — homoj, kiuj tenas tiajn erarajn pensojn, neniam ekvidos la esencon.
12. Tiuj, kiuj ekkonas la esencan kiel la esencan, kaj la ne-esencan kiel la ne-esencan, tenas pravajn pensojn, kaj ili ekvidos la esencon³.
13. Kiel la pluvo facile penetras malbone kovritan domon, same pasioj penetras ne-disciplinitan menson.
14. Kiel la pluvo ne povas penetri bone kovritan domon, same pasioj ne penetras bone disciplinitan menson.
15. Ĉi tie li lamentas; poste li lamentos; en ambaŭ statoj⁴ la malbon-faranto lamentas. Li lamentas kaj suferas kiam li vidas la malpurecon de siaj propraj agoj.
16. Ĉi tie li ĝojas; poste li ĝojos; en ambaŭ statoj la bon-faranto ĝojas kiam li vidas la purecon de siaj propraj agoj.
17. La malbon-faranto suferas en tiu ĉi kaj li suferos en la sekvonta mondo; en ambaŭ statoj li suferas. Li suferas pensante, "Malbonon mi faris". Li eĉ pli suferos kiam li iras sur la doloriga vojo⁵.
18. Ĉi tie li estas feliĉa; poste li estos feliĉa; en ambaŭ statoj la bonfaranto estas feliĉa. Li estas feliĉa pensante, "Bonon mi faris". Li estos eĉ pli feliĉa kiam li iras sur la bona vojo⁶.
19. Kvankam li povas citi la Sanktajn Tekstojn⁷, tamen li ne agas laŭ ili; tia sentaŭgulo estas kvazaŭ bovinpaŝtisto, kiu kalkulas la bovinojn de aliulo; li ne partoprenas en la frukto de la Nobla Vivo⁸.

³ Anstataŭ "la esenca" kaj "esenco" oni povas ankaŭ legi "la vera" kaj "vero"; la ideo estas la sama.

⁴ Tio signifas, en la nuna kaj sekvonta vivoj.

⁵ Tio estas la vojo kondukanta al pli mizera renaskiĝo.

⁶ La bona vojo estas la vojo kondukanta al pli feliĉa renaskiĝo kaj al Nirvano.

⁷ La Sanktaj Tekstoj : sendube temas pri la Tri Vedoĵ, ne pri budhismaj sanktaj tekstoj, ĉar tiuj ne ekzistis dum la vivtempo de la Budho. En la tempo de la Budho ekzistis nur tri Vedoĵ, ne kvar.

⁸ La frukto de la Nobla Vivo estas Nirvano.

20. Kvankam li povas citi nur malmulte el la Sanktaj Tekstoj, tamen li agas laŭ iliaj instruoj, forlasinte pasion, malamon, kaj nescion, entute komprenante kun liberigita menso kaj ne-ligite al io ajn en tiu ĉi aŭ sekvonta vivo; li vere partoprenas en la frukto de la Nobla Vivo.

Ĉapitro 2

Appamāda Vagga

Atentemo

21. Atentemo estas la vojo al Senmorteco¹; senatentemo estas la vojo al Morto². La atentemuloj ne mortas; la senatentemuloj estas jam kvazaŭ mortaj.
22. La saĝuloj, kiuj jam progresis en atentemo kaj tion klare ekkomprenis, ĝojas pro atentemo kaj pro la scio de la Arjanoj³.
23. La ĉiam meditemaj saĝuloj, kiuj estas firmaj, realizas la senkatenan Nirvanon.
24. La gloro de tiu, kiu estas energia, atentema, pura en siaj agoj, mem-disciplinita, kaj vivanta laŭ la Dharmo, konstante kreskas.
25. Per energia klopodo, atentemo, disciplino, kaj memregado, la saĝa homo faru por si insulon⁴, kiun nenio tajdo povos inundi.
26. La ne-scianto, la malsaĝulo, indulgas sin en malatentemo; sed la saĝulo rigardas atentemon kiel sian plej valoran trezoron.
27. Ne indulgu vin en malatentemo, kaj ne estu avida al sensplezuroj. Vere, la atentema, energia, kaj meditema persono akiros grandan benon.
28. Kiam la saĝulo anstataŭas malatentemon per atentemo, li, estante libera de suferado, grimpas al la alta palaco de saĝeco kaj rigardas de tie sur la malsaĝajn homojn tiel, kiel montogrimpanto rigardas sur la homojn starantajn en ebenaĵo.
29. Atentema inter la malatentemaj nomoj, plene vekita inter la dormantoj — tiel saĝulo antaŭenpuŝiĝadas, same kiel rapida ĉevalo postlasas malfortan ĉevalaĉon.

¹ "Senmorteco" signifas Nirvano.

² La vojo al Morto estas la vojo al konstanta renaskiĝo kaj morto en tiu ĉi mondo aŭ en iu ajn alia mondo.

³ La Arjanoj estas en Budhismo la Nobluloj, Sanktuloj, Arahatoj. "Arja" estas sanskrita termino, kiu signifas i.a. nobla, sankta, supera. En la pālġa lingvo, "Ariya".

⁴ Anstataŭ "insulo" oni povus legi "lampo", ĉar la vorto "dipa" signifas ambaŭ "insulo" kaj "lampo".

30. Pro atentemo Maghava'⁵ fariĝis la ĉefulo inter la dioj. Atentemo estas ĉiam laŭdata; malatentemo estas ĉiam riproĉata.
31. La monaĥo, kiu ĝojas pro atentemo kaj rigardas kun timo al malatentemo, antaŭeniras same kiel fajro brulanta ĉiujn katenojn, grandajn kaj malgrandajn.
32. La monaĥo, kiu ĝojas pro atentemo kaj rigardas kun timo al malatentemo, ne povas refali⁶, ĉar li estas proksima al Nirvano.

⁵ Maghava' estas alia nomo por Indra, unu el la ĉefaj dioj en la Tri Vedioj. Indra, Brahma, kaj Kama estas ofte citataj en budhismaj tekstoj.

⁶ Laŭ la doktrino Theravada, Arahato (sanktulo) ne povas refali, ĉar Arahateco estas dumviva nirvana stato, perfekta sankteco kaj libereco. Post morto la Arahato, same kiel Budho, atingas la Parinirvanon; t.e. la Finfinan Nirvanon, la liberiĝon de la Rado de Vivo kaj Morto.

Ĉapitro 3

Citta Vagga

La Menso

33. Same kiel arkisto rektigas sagon, saĝa homo rektigu sian tremantan, malfirman menson, kiu estas malfacile bridebla.
34. Same kiel fiŝo tirita el sia akva hejmo kaj jetita sur sekan teron, tiel ankaŭ la menso ekscitiĝas por fuĝi la influon de Mara'.
35. La menso estas malfacile regebla; ĝi estas eskapema, rapidema kien ajn ĝi inklinas; bridita menso kondukas al feliĉo.
36. La menso estas malfacile perceptebla kaj ekstreme subtila; ĝi turnas kien ajn ĝi klinmovas. La saĝa persono gardu ĝin, ĉar gardata menso kondukas al feliĉo.
37. Longdistance vojaĝanta, sole migranta, senkorpa kaj kuŝanta en kavo estas la menso. Personoj, kiuj bridas la menson, liberiĝos.
38. Tiu, kies menso ne estas firma, tiu, kiu ne konas la veran Dharmon kaj kies konfido estas konfuzita, neniam ekkonos perfektan saĝecon.
39. Tiu, kies menso ne estas trempita; tiu, kiu ne estas embarasita kaj transcendas ambaŭ bonon kaj malbonon¹ — por tia atentemulo ne ekzistas kaŭzo, pro kiu li devus timi.
40. Sciante, ke tiu ĉi korpo estas fragila kiel argila poto, oni fortigu la menson kiel kastelon. Oni ataku Mara'-n per la armiloj de scio. Venkinte, oni gardu sian venkon senpasie.

¹ Por la Perfektulo, tiu, kiu jam en vivo atingis nirvanecon, ne plu ekzistas diferenco inter bono kaj malbono, ĉar li estas liberigita kaj pro tio transcendis ambaŭ. Sed tio ne signifas, ke li povas fari kion ajn li volas. Vivante perfektan vivon laŭ la regularo de la Sangho, t.e. la Perfektulo (aŭ Sanktulo), ne plu kreas por si novajn karmajn rezultojn.

41. Ho ve! Post nelonge tiu ĉi korpo kuŝos [morta] sur la grundo, forĵetita² kaj sen konscio, same kiel putra lignopeco.
42. Kion ajn malamiko faru al malamiko, au malamanto al malamanto, malbone direktita menso povas kaŭzi al ni multe pli gravan domaĝon.
43. Kion nek patrino nek patro, nek iu ajn parenco povas fari por ni, kapablas fari al ni bone direktita menso.

² Forĵetita : en antikva tempo oni ofte simple metis mortintojn sur tombejo por ke bestoj formanĝu la kadavrojn. Simile oni ankoraŭ parte faras en Tibeto. Kadavro sen "animo" kaj konscio ne estas pli ol eluzita sako. La fakto tamen restas, ke plej ofte nur la kadavroj de malriĉuloj estis tiel traktataj, ĉar en Hindujo kaj Tibeto mankas al malriĉuloj la mono por aĉeti lignon por bruligi kadavrojn.

Ĉapitro 4

Puppha Vagga

Floroj

44. Kiu venkos super tiu ĉi tero, super la mondo de Jama'¹ kaj super la regno de la dioj ?
Kiu esploras la bone montritan Vojon de virto, kiel ĝardenisto kolektas la ĝustan floron ?
45. La adepto venkos super tiu ĉi tero, super la mondo de Jama' kaj super la regno de la dioj.
La adepto esploras la bone montritan Vojon, kiel ĝardenisto kolektas la ĝustan floron.
46. Tiu, kiu komprenas, ke la korpo nur estas kiel ŝaŭmo kaj konas ĝin kiel miraĝ-natura, rompos la flor-pintitan sagon² de Jama' kaj eskapos lian vidon.
47. Morto forportos viron, kiu kun konfuzita menso³ kolektas florojn, same kiel tajdo forportas dormantan vilaĝon.
48. Viro, kiu kun konfuzita menso kolektas florojn, kaj kiu estas nesatigebla en deziro, certe falos sub la influon de Jama'.
49. Same kiel abelo kolektas la nektaron kaj forflugas sen difekti la floron, koloron, nek odoron, tiel la saĝulo iru tra vilaĝo.
50. Nek la fi-agojn aŭ erarojn de aliuloj, nek la aferojn faritajn aŭ nefaritajn de aliuloj, sed siajn proprajn agojn faritajn aŭ nefaritajn vidu la saĝulo.
51. Same kiel belega sed senodora floro estas la bone parolitaj vortoj de tiu, kiu ne agas laŭ ili.

¹ Jama' estas la hindua reĝo de Morto. La mondo de Jama' estas la kvar dolorigaj statoj: purgatorio, la regno de la bestoj, la regno de la spiritoj, kaj la regno de la demonoj.

² La flor-pintita sago ĉi tie apartenas al Jama', sed en Hinduismo ĝi apartenas al Kāma, la dio de pasia amo.

³ Kolekti florojn kun konfuzita menso: malatenteme kolekti florojn dum danĝeraj serpentoj (pasioj) povas esti inter la floroj (la plezuroj de tiu ĉi mondo).

52. Sed same kiel belega floro, plena je koloroj kajodoro estas la fruktoplenaj vortoj de tiu, kiu mem agas laŭ ili.
53. Same kiel oni povas fari multajn girlandojn el amaso da floroj, tiel oni devus fari multajn bonajn agojn se naskita kiel homa estaĵo.
54. Laodoro de floroj aŭ de santal-ligno⁴, tagara'⁵ kaj vassiki'⁶, ne bloviĝas kontraŭ la vento, sed laodoro de la virtoj bloviĝas kontraŭ la vento; la virto de homo trapenetras ĉiujn direktojn.
55. Santal-ligno, tagara', lotuso kaj vassiki' : inter tiuj parfumoj la parfumo de ia virto estas la plej bona.
56. Sensignifa estas laodoro de tagara' aŭ santalo kompare al laodoro de virtulo, kio eĉ bloviĝas inter la dioj kaj estas supera.
57. Tiuj, kiuj posedas tiajn virtojn; tiuj, kiuj vivas atenteme kaj estas liberigitaj pro vera scio — Mara' neniam trovos ilian vojon⁷.
58. Kiel sur apud-vojo-ĵetita rubo povas kreski dolĉodora, beleta lotus-floro, same povas disĉiplo de
59. la Plene Enlumigito pro sia scio brili inter sentaŭgaj homoj, kiuj migras en mallumeco⁸.

⁴ Santal-ligno estas konata tre bonodora arbo en Hindujo, el kiu oni fabrikas man-ventumilojn, sapon, pudron, k.t.p.

⁵ Tagara' estas bonodora arbusto, el kiu oni ankaŭ fabrikas pudron, parfumon, k.t.p.

⁶ Vassiki' estas la konata, tre bonodora hinda jasmenfloro. Oni fabrikas el ĝi multajn bonodorajn produktojn, kaj oni ŝatas doni la nomon "Jasmeni" al filinoj.

⁷ La vojo de la Arahatoj (sanktuloj) ne estas trovebla de dioj nek de Mara', kaj ili ne plu povas veni sub ties influon.

⁸ Mallumeco estas simbolo por nescio.

Ĉapitro 5

Bāla Vagga

Stultuloj

60. Longa estas la nokto por tiu, kiu ne povas endormiĝi; longa estas la mejlo por la ellacigita migranto; longa estas la rondo de naskiĝoj kaj mortoj¹ por la stultulo, kiu ne konas la pravan Dharmon.
61. Se solece migranta adepto ne renkontiĝas kun aliulo, kiu estas pli bona ol li mem, aŭ egalnivela al li, li firme antaŭen-paŝu, ĉar ne indas al li kamaradeco kun stultuloj.
62. "Filojn mi havas; riĉaĵojn mi havas" — per tiaj pensoj la stultulo turmentiĝas.
Vere! Eĉ li ne apartenas al si mem; kiom malpli, do, filoj kaj riĉaĵoj !
63. La stultulo, kiu scias, ke li estas stulta, estas pro tio saĝa homo; sed la stultulo, kiu pensas, ke li estas saĝa, estas prave nomata stultulo.
64. Kvankam stultulo dum sia tuta vivo asociiĝas kun saĝulo, li tamen ne komprenas la Veron² pli, ol kulero povas gustumi la supon.
65. Kvankam inteligenta persono asociiĝas kun saĝulo dum nur unu momento, li baldaŭ perceptas la Veron, same kiel lango povas gustumi la supon.
66. Stultuloj kun malmulte da kompreno estas siaj propraj plej grandaj malamikoj, ĉar ili faras malbonajn agojn, kiuj alportas amarajn fruktojn³.
67. Tiu ago ne estas bone farita, pri kiu oni devas penti kaj plori pro ĝia rikoltita amara frukto.
68. Tiu ago estas bone farita, pri kiu oni ne bezonas penti, sed pro kiu oni kun ĝojo kaj plezuro rikoltas la [dolĉan] frukton.
69. "Ĝi estas dolĉa kiel mielo," pensas la stultulo pri la farita malbona ago tiom longe, kiom ĝi ankoraŭ ne maturiĝis; sed kiam ĝi estas maturiĝinta, la stultulo suferas.

¹ La rondo de naskiĝoj kaj mortoj estas en Budhismo nomata Sangsaro; en la Sanskrita kaj Palia lingvoj, la termino estas skribata "Samsara".

² La Vero: temas pri la Dharmo, la doktrino de la Budho.

³ Amarajn fruktojn: la malbonaj rezultoj de malbonaj agoj faritaj dum tiu ĉi vivo aŭ en pasinta vivo.

70. Monaton post monaton la stultulo manĝu per Kusaĥerbo⁴ siajn manĝojn; tamen li ne valoras la deksezonon de tiuj, kiuj bone komprenas la Veron.
71. Same kiel freŝa lakto ne tuj kazeiĝas, tiel ankaŭ [ofte] malbona ago ne tuj alportas amaran frukton; sed bruletante kiel cindro-kovrita fajro, ĝi sekvas la stultulon.
72. Kiam la malbona ago de la stultulo fariĝas konata, ĝi kaŭzas suferon al li kaj detruas lian brilan ŝancon, konfuzante lian menson⁵.
73. Stultulo deziras akiri nemerititan reputacion, antaŭecon inter la monaĥoj, aŭtoritaton en la monaĥejo, kaj honoron inter la laikuloj⁶.
74. "La laikuloj kaj monaĥoj pensu : 'per li tio estas farita'; rilate al ĉiu laboro, granda aŭ malgranda, ili turnu sin al mi". Tia estas la ambicio de stultulo, kaj liaj deziroj kaj fiero ankoraŭ pligrandiĝas.
75. Unu estas la vojo al mona gajno; alia vojo kondukas al Nirvano. Se monaĥo, disciplo de la Budho, tion bone komprenas, li ne strebu al mondaj favoroj, sed kulturu en si apartiĝon de la mondo.

⁴ Kusa-herbo estas kvazaŭ "sankta herbo" en Hinduismo. Kelkaj asketoj en la tempo antaŭ kaj dum la vivo de la Budho manĝis siajn manĝojn per pinto de Kusa-herbo. Kusa-herbo estas ankaŭ uzata en Vedaj ritoj de la Brahmanoj, kaj kiel polstro sub antilop-felo, sur kiu hindua Jogulo sidas kaj meditas.

⁵ Au "frakasante lian kapon". Tio signifas, detruante la eblecon akiri saĝecon.

⁶ La monaĥa robo ne estas protekto kontraŭ ĉiuj malbonaj tendencoj, agoj, kaj deziroj. Eĉ en vivtempo de la Budho troviĝis malbonaj gemonaĥoj; pro ili la regularo ("vinajo") fariĝis pli kaj pli severa.

Ĉapitro 6

Pandita Vagga

La Saĝulo

76. Se oni renkontiĝas kun saĝulo, kiu same kiel trovinto de trezoro elmontras niajn erarojn kaj admonas nin, oni asociiĝu kun tiu saĝa homo; ĉar estas je la plej granda bono, kaj ne je la malbono, se oni asociiĝas kun li.
77. Permesu al li admoni vin kaj deteni vin de malbono; vere, bonuloj amas lin, sed de la malbonuloj li estas malamata.
78. Ne asociiĝu kun malbonaj amikoj, ne havu fiulojn kiel amikojn; sed havu bonulojn kiel amikojn, asociiĝu kun noblaj homoj !
79. Tiu, kiu estas saturita de la Dharmo, vivas feliĉe kun pacigita menso; saĝa homo ĉiam ĝojas pri la Dharmo kiel ĝi estas proklamita de la Arjanoj¹.
80. Kanal-konstruantoj direktas la akvon; arkistoj fleksas la arkojn; ĉarpentisto kurbigas pecon da ligno; la saĝulo regas sin mem.
81. Solida roko estas ne-skuebla pro la vento; same la saĝulo restas senmova pro laŭdo aŭ mallaŭdo.
82. Kiel profunda, klara, trankvila lago fariĝas la saĝulo serena kiam li aŭskultis la instruojn².
83. Bonuloj estas tenataj al nenio; noblaj homoj ne fiparolas nek sopiras al sens-plezuroj; se iu tia estas tuŝita de feliĉo aŭ malfeliĉo, li ne sentas altigon nek malaltigon de la spirito³.
84. Se homo ne deziras je sia profito nek je la profito de aliulo filon, ricaĵon, aŭ regnon akirita per maljustaj rimedoj — tiam li prave estas nomata virta, saĝa, kaj justa.
85. Nur malmultaj inter la homoj estas tiuj, kiuj transiros al la alia bordo; la plej multaj homoj restas sur tiu ĉi flanko kaj [sencele] kuras tien

¹ La budhanaj sanktuloj. "Arja" signifas i.a. nobla, sankta, perfekta.

² La instruojn de la Dharmo.

³ T.e. li restas egalanimeca.

kaj reen⁴.

86. Sed tiuj, kiuj agas laŭ la bone instruita dharmo, atingos Nirvanon, transirante la regnon de la pasioj, kio estas tre malfacila.
87. Forlasinte la hejman vivon por la senhejma vivo, la saĝa viro evitu la mallumajn statojn kaj kulturu la lumajn statojn.
88. Li trovu grandan ĝojon en soleco — kio estas tre malfacila. Forlasinte ĉiujn sens-plezurojn kaj inklinojn, la saĝulo puriĝu de ĉiuj malpuraĵoj de la menso.
89. Tiu, kies menso estas bone fondita en la Paŝoj al Enlumiĝo⁵ kaj sen inklinoj, ĝojas pro seninkliniĝo al io ajn; tiuj, la ne-koruptitoj, la enlumigitoj, jam atingis Nirvanon en tiu ĉi mondo.

⁴ Tien kaj reen kuras homoj sen idealoj, sen vivfilozofio, aŭ provantaj ĉiujn sistemojn, religiojn, k.t.p., sen esti kapablaj elekti nek kompreni ion ajn. Tiaj homoj vivas en la mallumeco de spirita nokto. Arturo Schopenhauer nomas ilin "Fabrikware der Natur" — fabrikproduktaĵoj de naturo.

⁵ La Sep Paŝoj al Enlumigo: atentemo, studado de la Dharmo, energio, ĝojo, trankvileco, meditado, kaj egalanimeco.

Ĉapitro 7

Arahanta Vagga

La Noblulo

90. Por tiu, kiu entute liberiĝis, kaj por tiu, kiu jam detruis ĉiujn ligilojn kaj finis la migradon¹, la suferado ne plu ekzistas.
91. La atentemuloj migras kiel cignoj, kiuj forlasis lageton, de loko al loko; kaj al nenia hejmo ili estas ligitaj².
92. Tiuj, kiuj ne kolektas posedaĵojn kaj estas sendeziraj al siaj manĝoj kaj strebas al la malplena, sensigna liberigo — ili similas al birdoj en aero, kies spurojn oni ne povas sekvi.
93. Tiu, kies koruptaĵoj estas detruitaj; tiu, kiu ne estas avida al siaj manĝoj kaj havas liberiĝon, kiu estas malplena kaj sensigna je sia celo — ties vojo similas al tiu de la birdoj en la aero, kies spurojn oni ne povas sekvi.
94. Tiu, kies sensoj estas regitaj same kiel ĉevalo estas regata de rajdisto; kies fiero estas detruita, kaj kiu estas libera de ĉiuj koruptaĵoj — tian firman homon eĉ la dioj envias³.
95. Same kiel la tero, tiel ekvilibrita kaj bone disciplinita homo ne sentas indignon. Tiu estas komparebla al kolono, al lagetito sen koto; la migrado tra Sangsaro⁴ estas finita por ili.
96. Paca estas lia menso, paca estas lia voĉo, kaj pacaj estas liaj agoj; bone kompreninte tion, li estas entute liberigita, paca kaj kvieta.
97. La viro, kiu ne estas kredema, sed komprenas la Ne-kreitan⁵; kiu tranĉis ĉiujn ligilojn; kiu detruis ĉiujn oportunojn⁶ kaj jam forlasis ĉiujn dezirojn — li vere estas supera homo.

¹ Finis la migradon: estas certe, ke la rondo de Vivo kaj Morto nun finiĝas.

² Budhanaj monaĥoj estas senhejmuloj, kaj ne rajtas esti ligitaj al ia loĝloko.

³ En Budhismo, Dio kaj dioj nur estas iamaj homoj, kiuj pro bonaj agoj renaskiĝis en portempaj ĉieloj; ili ne estas superaj al Budho aŭ al Arahatoj, kaj ofte budhismaj popol-legendoj montras ilin kvazaŭ servantoj de la Budho, Arahatoj, kaj Bodhisatvoj.

⁴ Sangsaro estas la Rondo de Vivo kaj Morto : la mondo.

⁵ La Ne-kreito: la Nirvano, kio estas sen komenco kaj sen fino.

⁶ Oportunoj: kaŭzoj, okazoj, aŭ temptaĵoj al agoj, bonaj aŭ malbonaj.

98. En vilaĝo aŭ en arbaro, sur ebenaĵo aŭ sur monto —kie ajn Arahatoj loĝas estas rava loko.
99. Ravaj estas la arbaroj, en kiuj mondano ne trovas ravon⁷; tie la senpasiuloj trovas ravon, ĉar ili ne serĉas sens-plezurojn.

⁷ "Arbaroj" en Hindujo kaj najbaraj landoj estis kaj ankoraŭ grandparte estas ĝangaloj, en kiuj abundas sovaĝaj bestoj, reptiloj, insektoj, k.t.p. Joguloj kaj Arahatoj amas tiajn lokojn, ĉar ili ne konas timon. Foje — treege malofte — oni aŭdas, ke konata Jogulo aŭ Arahato estis atakata de sovaĝa besto aŭ serpento, aŭ eĉ mortigita.

Ĉapitro 8

Sahassa Vagga

La Milo

100. Pli bona ol mil diraĵoj konsistantaj el senvaloraj vortoj, estas unu valora vorto, per kiu, aŭdante ĝin, oni paciĝas.
101. Pli bona ol mil versoj konsistantaj el senvaloraj vortoj, estas unu valora linio, per kiu, aŭdinte ĝin, oni paciĝas.
102. Kvankam persono povas citi cent versojn konsistantajn el senvaloraj vortoj, pli bona estas nur unu vorto de la Dharmo, per kiu, aŭdante ĝin, oni paciĝas.
103. Kvankam homo povas venki mil malamikojn sur batalkampo, tamen estus pli glora venkinto, kiu venkis sin mem.
104. Vere, la venko super la memo estas pli glora venko ol la venko super aliuloj;
105. nek dio nek anĝelo, nek Mara' nek Brahma' povus ŝanĝi al malvenko la venkon de tiu, kiu venkis sin mem kaj ĉiam vivas sin-retene.
106. Kvankam viro monaton post monaton dum cent jaroj oferus mil or-pecojn, tamen se oni nur dum momento montras respekton al iu, kiu mem-perfektigis, tiu respekto estas pli bona of oferedo dum cent jaroj.
107. Kvankam viro gardus dum cent jaroj la sanktan fajron¹ en arbaro, tamen se oni nur dum momento respekt-salutas personon, kiu perfektigis sin mem, tiu ago estas multe pli meritinda ol centjara fajro-oferedo.
108. Kion ajn homo oferas en tiu ĉi mondo kiel oferaĵon dum tuta jaro por akiri meriton, la tuto ne valoras eĉ kvarone tiom, kiom la respekto montrita al justulo, kio estas pli meritplena.
109. Tiu, kiu ĉiam respektive salutas la Estimatulojn² — kvar benoj rezultos por li, nome: longa vivo, beleco, feliĉo, kaj forto.

¹ Brahmanoj kaj hinduaj aske tuloj adoras la fajron kiel la dion Agni'. Origine oni supozeble nur oferis fruktojn, fluantan buteron,k.t.p. Nur kiam la potenco de la brahmanoj kreskis ili enkondukis oferaĵojn de bestoj; la plej grava estis la oferedo de ĉevaloj.Tiajn kruelajn oferaĵojn la Budho kaj Mahaviro forte kontraŭstaris kaj kondamnis.

² Estimatuloj pli aĝaj budhanaj gemonanoj.

110. Kvankam oni povus vivi dum jarcento senmorale kaj sendiscipline, vere pli bona estus la nur unutaga vivo³ de homo, kiu vivas morale kaj mediteme.
111. Kvankam oni povus vivi dum cent jaroj sen saĝeco kaj sen memrego, vere pli bona estus nur unutaga vivo de tiu, kiu vivas saĝe kaj mediteme.
112. Kvankam oni povus vivi dum jarcento malageme, vere pli bona estus la nur unutaga vivo de tiu, kiu estas plena de energio.
113. Kvankam oni povus vivi dum jarcento sen kompreno pri la komenco kaj fino de ĉio, kio ekzistas, tamen pli bona estas la nur unutaga vivo de tiu, kiu komprenas la komencon kaj finon de ĉio, kio ekzistas.
114. Kvankam oni povus vivi dum cent jaroj sen percepti la Senmortan Staton⁴, vere pli bona estas la nur unutaga vivo de tiu, kiu perceptis la Senmortan Staton.
115. Kvankam oni povus vivi dum jarcento sen percepti la plej altan Veron⁵, vere pli bona estus la nur unutaga vivo de tiu, kiu vidis la plej altan Veron.

³ Kvankam hamo dum la tuta vivo, escepte unu nura tago, vivus konscie malbonan vivon, li tamen meritis respekton de aliuloj. En la Sutroj (prelegoj) oni ofte legas, ke senvirtuloj, krimuloj, aŭ fi-virinoj, post renkontiĝo kun la Budho, ŝanĝiĝis kaj atingis la unuan paŝon al sankteco — sed la saman tagon estis mortigataj de sovaĝaj bestoj, virbovo, aŭ eĉ bovino.

⁴ La Senmorta Stato estas la Nirvano, la fino de suferado, la tuta liberiĝo de renaskiĝoj kaj mortoj.

⁵ La plej alta Vero estas la Dharmo de la Budho, per kiu ni liberiĝos se ni vivas sincere kaj firme laŭ ties instruoj, konsiloj, kaj admonoj. La Budho estas kvazaŭ kuracisto, kiu preskribas la medicinon, kiun ni devas preni por resaniĝi; estas al ni, ĉu preni la medicinon aŭ ne. Adorado de la kuracisto ne helpus; nur la sekvado de liaj ordonoj, ke ni prenu la medicinon. Same pri la Budho; ni devas sekvi liajn instruojn por resaniĝi de ĉiuj mizeroj kaj atingi Nirvanon; nura adorado de la Budho (pere de statuoj) ne helpos !

Ĉapitro 9

Pāpa Vagga

Malbono

116. Rapidu kaj faru bonajn agojn; detenu vian menson de malbono; ĉar la menso de tiu, kiu estas malrapidema por fari bonajn agojn, ŝatas indulgi sin en tio, kio estas malbona.
117. Se persono faris malbonan agon, li ne faru ĝin denove kaj denove; li ne trovu plezuron en malbonaj agoj; dolora ja estas la amasiĝo de malbonaj agoj.
118. Se persono faris bonan agon, li devus fari ĝin denove kaj denove; li devus trovi plezuron en farado de bonaj agoj; benita estas la amasiĝo de meritoj.
119. Eĉ malbonfaranto vidas bonon en la malbono tiom longe, kiom ĝi ankoraŭ ne maturiĝis; sed se ĝi portos frukton¹, tiam li vidos la malbonan rezulton.
120. Eĉ bonulo vidas malbonon tiom longe, kiom la farita bona ago ne maturiĝas; sed kiam ĝi portos frukton, la bonulo vidos la bonan rezulton.
121. Ne pensu facilanime pri la malbono, dirante, "Tio ne multe gravas al mi"; eĉ malrapide falantaj akvogutoj povas plenigi ujon; en la sama maniero la stultulo pleniĝas de malbono.
122. Ne pensu facilanime pri merito, dirante, "Tio ne multe gravas al mi"; eĉ malrapide falantaj la akvogutoj povas plenigi ujon; sammaniere saĝa viro pleniĝas iom post iom de boneco.
123. Same kiel komercisto kun nur malgranda eskorto, sed kun riĉaĵoj, evitas danĝerajn vojojn; aŭ kiel homo, kiu volas vivi, evitas venenon; same oni devus eviti malbonajn agojn.
124. Se oni ne havas vundon en mano, oni povas porti venenon en ĝi; veneno ne tuŝas iun, kiu ne havas vundon; same nenio malbono povas okazi al iu, kiu ne malbone agas.
125. Se homo ofendas nedanĝeran personon — iun, kiu estas pura kaj senkulpa — sur tiun stultulon la malbono refalos kiel polvo ĵetita kontraŭ vento.

¹ Frukto : la rezulto aŭ reago de la farita ago, bona aŭ malbona.

126. Kelkaj [homoj] naskiĝas en ventro²; malbon-farintoj renaskiĝos en malfeliĉaj statoj³; la justuloj iros al benitaj statoj⁴; kaj tiuj, kiuj entute liberiĝis, atingos Nirvanon.
127. Nek en la ĉielo, nek en la mezo de la oceano, nek en monta groto oni trovas sur la tero lokon, kie oni povas kaŝiĝi kaj fuĝi la rezulton de malbona ago.
128. Nek en la ĉielo, nek en la mezo de la oceano, nek en monta groto oni povas trovi sur la tero la lokon, kie oni povus kaŝiĝi por ne esti frapata de morto.

² Laŭ budhisma doktrino, homo ne renaskiĝos nur inter homoj, sed ankaŭ povas renaskiĝi inter birdoj, demonoj, bestoj, aŭ dioj.

³ En la Palia lingvo la vorto uzata por la malfeliĉaj statoj fakte estas "Niraya", kio signifas lokon aŭ staton sen feliĉo — tre ofte, sed erare, tradukita kiel "infero".

⁴ Benitaj statoj povas esti portempaj ĉeloj aŭ surtera feliĉo.

Ĉapitro 10

Danda Vagga

Bastono

129. Ĉiuj estaĵoj tremas pro la bastono. Ĉiuj estaĵoj timas morton. Komparante aliulojn al si mem, oni devus ne bati ilin, nek kaŭzi, ke oni batu.
130. Ĉiuj estaĵoj tremas pro la bastono. La vivo estas amata de ĉiuj estaĵoj. Komparante sin mem al aliuloj, oni devus ne bati ilin, nek kaŭzi, ke oni batu.
131. Kiu ajn, serĉante sian propran feliĉon, vundas per bastono¹ aliajn feliĉo-amantajn estaĵojn, ne spertos feliĉon poste².
132. Kiu ajn, serĉante sian propran feliĉon, ne vundas per bastono aliajn feliĉo-amantajn estaĵojn, spertos feliĉon poste.
133. Ne parolu malĝentile al iu ajn persono. Tiuj, la tiele alparolitaj, rediros. Doloriga estas vere la venĝema parolo. Interŝanĝitaj batoj povus vundi vin.
134. Se vi silentiĝis kiel splitita tamtamo, vi jam atingis Nirvanon; nenia venĝemo estas trovebla en vi³.
135. Same kiel la paŝtisto devigas bovinojn iri al la paŝtejo, tiel ankaŭ maljunaĝo kaj morto devigas la vivojn iri el la estaĵoj.
136. Se malsaĝulo faras malbonan agon, li ne komprenas tion; sed la malvirta homo brulas kiel fajro pro siaj propraj malbonaj agoj⁴.
137. Tiu, kiu per bastono batas senkulpan kaj sendefendan personon, baldaŭ suferos en unu el jenaj dek statoj:
138. Li suferos pro severa doloro, perdo, akcidento, severa malsano aŭ mensmalsano; aŭ
139. persekutado fare de la reĝo [aŭ aŭtoritatoj], aŭ severa akuzado, aŭ perdo de parencoj, aŭ detruo de posedaĵoj, aŭ

¹ Aŭ per ia ajn alia batilo aŭ armilo.

² "ne spertos feliĉon poste" signifas, ne trovos bonan renaskiĝon, sed estos tre verŝajne renaskata en subhoma stato.

³ Pli korekte estus diri, "kvazaŭ atingis Nirvanon" aŭ "estas proksime de Nirvano".

⁴ Tio signifas, ke la konscia malbonulo turmentas sin mem pro sia malbona ago, speciale se ĝi estas grava krimo, kiel ekz. murdo

140. fulmo bruligos lian domon; kaj post la morto, tia malsaĝa homo estos renaskata en mizera stato⁵
141. Nek per nudeco, nek per karbuklita hararo, nek per malpureco, nek per cindroj, nek per senmova sidado povas mortulo, kiu ne venkis dubojn⁶, purigi sin.
142. Kvankam homo estas riĉe kaj multkoloro vestita, se li vivas pace kaj disciplinite, kaj ne uzas bastonon kontraŭ aliaj vivantaj estaĵoj, tiu homo estas prave nomata Brahmano; li estas asketulo; li estas Bhikŝuo⁷.
143. Malofte estas trovebla en tiu ĉi mondo persono, kiu estas sinretenema pro modesteco kaj evitas doni kaŭzon por riproĉoj, kiel bone bredita ĉevalo evitas la vipon.
144. Same kiel bone bredita ĉevalo evitas la vipon, tiel vi estu agema. Per konfido, virto, kaj forto; per studado de la Dharmo; per koncentriĝo kaj scio, bona konduto kaj atentemo — vi faru finon al tiu ĉi granda suferado⁸.
145. Kanal-konstruantoj direktas la akvon; arkistoj fleksas la arkojn; ĉarpentisto kurbas pecon da ligno; la saĝulo regas sin mem⁹.

⁵ Ĉi tiuj dek statoj ne estas minacoj, nek punoj fare de la Budho, sed sole avertoj. En Budhismo ekzistas nek komandoj nek minacoj, sed nur admonoj, konsiloj, kaj avertoj.

⁶ La praktikoj ĉi tie menciitaj estas tiuj de hinduaj kaj ĵainaj asketuloj, ne de budhanaj gemonahoj. Budho ne favoris tiajn ekstremajn praktikojn, sed en ĉio iris la mezan vojon inter du ekstremoj.

⁷ En ĉi tiu verso la Budho klare diras, ke tio, kio gravas, ne estas la ekstera aspekto nek la vestoj de homo; grava estas nur la prava konduto.

⁸ La granda suferado estas la rondo de naskiĝoj kaj mortoj.

⁹ La sama verso kiel n-ro 80. En budhismaj libroj oni ofte ripetas versojn kaj sutrojn, kelkfoje kun nenia ŝanĝo. Tion oni intence faris, por ke la monaĥoj povu pli facile rememoriĝi al trafikaj tekstoj, kaj por faciligi parkeran lernadon.

Ĉapitro 11

Jarā Vagga

Maljuniĝo

146. Kial oni ridas? Kial plezuro dum la mondo brulas? Estante ĉirkaŭata de mallumego, kial vi ne serĉas la lumon¹?
147. Rigardu ĉi tiun belegan korpon: amaso da vundoj, amasita bulo; malsana, plena de pensoj; en ĝi nenio daŭros, nenio persistos.
148. Tute eluzita estas tiu ĉi korpo: plena de malsano; pereema. Tiu putra maso baldaŭ dissolviĝos. Vere, la vivo finiĝos en morto².
149. Same kiel forĵetitaj kukumoj en aŭtuno estas tiuj ĉi blankaj ostoj. Kia plezuro estas en rigardado al ili ?
150. Tiu ĉi urbo estas farita el ostoj kaj kovrita de karno kaj sango. En ĝi estas amasita maljuniĝo, morto, fiero, kaj kalumnio.
151. Eĉ la ornamitaj ĉaroj de reĝo eluziĝas; same ankaŭ korpo eluziĝas kiam ĝi atingis maljunecon.
152. Tiu, kiu nenion aŭdis, nenion komprenis; tiu homo maljuniĝas laŭ la maniero de bovoj: lia ventro kreskas pli kaj pli, sed lia kompreno neniam kreskos.
153. Tra multaj naskiĝoj mi migris en la sangsaro, serĉante sed ne trovante la konstruanton³ de la domo⁴. Doloriga estas naskiĝo kaj renaskiĝo, denove kaj denove.
154. Ho konstruanto! Vi estas vidita! Vi ne plu denove konstruos domon⁵. Ĉiuj viaj traboj estas rompita; la tegmentstango estas frakasita.

¹ Oni memoru, ke la versoj estas ĉefe adresitaj al budhanaj gemonahoj; pro tio oni renkontas severajn admonojn, kiuj ne taŭgas al la laikuloj. "La lumo" en ĉi tiu verso estas la Leĝo aŭ Dharma de la Budho.

² Kvankam la vivo finiĝas en morto, tio ne signifas, ke ĉio estas finita. Kiel ni scias, morto estas nur la enirejo en novan vivon, same ĉu ni ŝatas tion aŭ ne. Sole Arahatoj kaj Budhoj liberiĝas de renaskiĝoj — la finfina celo de ĉiu vera budhano, egale al kiu skolo li apartenas.

³ La konstruanto ne estas dio, sed la Soifo (en Sanskrito nomata "triṣṇa" kaj en Pali' "tanha"), la Volo al Vivo en la filozofio de Arturo Schopenhauer.

⁴ "Domo" estas simbolo por la korpo.

⁵ Se oni liberiĝas de tiu Soifo, ĝi ne plu povos konstrui novan "domon".

155. Tiuj, kiuj ne vivis noblan vivon kaj ne gajnis trezoron⁶ dum juneco, pereos kiel maljunaj ardeoj en laĝeto sen fiŝoj.
156. Tiuj, kiuj vivis sendisipline kaj ne gajnis trezoron dum juneco, estas similaj al eluzita arko; kuŝante ili sopiras al la pasinto.

⁶ Anstataŭ "trezoro" oni povus diri "propraĵoj" aŭ "ŝparaĵoj".

Ĉapitro 12

Atta Vagga

La Memo

157. Se homo pensas pri si mem kare, li devus bone protekti sin; dum ĉiu gardoparto de la nokto la saĝa homo devus esti gardema¹.
158. Oni devus unue korekti sin mem al tio, kio estas prava; poste oni rajtos instrui aliulojn. Tia saĝa homo ne estos riproĉata.
159. Same kiel oni instruas aliulojn, tiel oni devus mem agi. Estante tute disciplinita, oni povas disciplini aliulojn; ĉar la memo estas malfacile disciplinebla.
160. Oni estas la sinjoro de sia propra memo; oni estas sia propra savanto — kiu alia savanto povas esti trovata? Havante bone regitan memon, oni trovas en ĝi la propran savanton malfacile troveblan aliloke.
161. Pro si mem oni agas malbone; la malbono estas memnaskita, memfarita. La malbono strekas la malsaĝulon kiel la diamanto strekas malmolan gemon.
162. Tiu, kiu estas tre koruptita — same kiel la grimplanto "maluva" sufokas sal-arbon², li agas kontraŭ si mem, kiel malamiko deziras al li.
163. Malbonaj agoj kaj agoj, kiuj ne estas benitaj al ni, estas facile fareblaj; sed tre malfacile estas fari profitajn kaj bonajn agojn.
164. La stulta homo, kiu pro falsaj vidpunktoj malŝatas la instruojn de la Arahatoj kaj Arjanoj, maturiĝas kiel la frukto de la kaŝta-kano — nome, je sia propra detruigo.

¹ Budhanaj monaĥoj ofte meditas dum unu aŭ pli da gardopartoj de la nokto. La Budho mem ne dormis pli ol du aŭ tri horojn nokte.

² La grimplanto "maluva" abundas en Hindujo. La sal-arbo estas bonodora; la Budho mortis sub sal-arboj. Vidu la Mahaparinirvana-sutron.

165. Pro si mem oni agas malbone; pro si mem oni fariĝas makulita. Pro si mem malbono ne estas farata; pro si mem oni puriĝas. Pureco kaj malpureco dependas de ni mem. Neniu povas purigi aliulon³.
166. Neniu forgesu, pro helpemo al aliuloj, sian propran bonfarton. Klare perceptante sian propran bonfarton, oni estu atentema al sia propra celo⁴.

³ Origina Budhismo ne rekonas savanton, kiu povas purigi aŭ savi aliulojn. Oni mem kreas sian propran Karmon, do oni ankaŭ devas savi sin mem aŭ purigi sin mem. Tamen, la Budhoj, Bodhisatvoj, kaj sanktuloj povas per la Dharmo doni bonajn konsilojn kaj montri metodojn, laŭ kiuj oni povas purigi kaj savi sin mem. Post la historia Budho Gautamo, multaj novaj sektoj ekstarigis, kaj ne ĉiuj tenis al la origina doktrino; novaj ideoj kaj formoj enfluis ĝis oni preskaŭ ne plu rekonis la originan Dharmon.

⁴ Kvankam budhano, kaj precipe Bodhisatvo, ĉiam estas preta senmemece helpi aliulojn, la Budho rekomendis saĝan konsideron pri la maniero de la helpo kaj pri kiom longe ĝi povas esti donata sen kaŭzi damaĝon al si mem kaj perdi sian propran altan celon.

Ĉapitro 13

Loka Vagga

La Mondo

167. Ne sekvu falsan doktrinon. Ne vivu senpripense. Ne tenu falsajn vidpunktojn. Ne estu jesanto al la mondo¹.
168. Ne staru senpripenseme, sed bone kaj skrupuleme tenu al la praktikado². Tiu, kiu tenas al tiu ĉi praktikado, vivos feliĉe en la nuna mondo kaj en la sekvonta³.
169. Atenteme tenu al la praktikado. Ne praktiku malatenteme. Tiu, kiu tenas al tiu ĉi praktikado, vivas feliĉe en la nuna mondo kaj en la sekvonta.
170. Pensu pri la mondo kiel pri veziko; rigardu ĝin kiel miraĝon. La reĝo de Morto ne vidas tiun, kiu tiel rigardas la mondon⁴.
171. Venu kaj rigardu tiun ĉi mondon, kiu similas al ornamita reĝa ĉaro; la stultuloj baraktas en ĝi, sed la saĝulo ne estas ligita al ĝi.
172. Tiu, kiu vivis sendisipline sed poste sobriĝis, briligas la mondon kiel la luno libera de nuboj.
173. Tiu, kiu per bona ago kovras la faritan malbonon⁵, briligas la mondon kiel la luno libera de nuboj.
174. Blinda estas tiu ĉi mondo. Malmultaj estas la homoj, kiuj klare vidas. Same kiel birdoj fuĝas el reto, malmultaj homoj iras al benitaj statoj⁶.

¹ Oni vivu en la mondo sed ne estu pasie ligita al ĝi.

² Temas pri la praktikado de almozirado fare de budhanaj gemonahoj. La admono "ne staru senpripense" aludas al la devo de almoziranto radiumi bonajn pensojn kaj benojn al la laikulo, kiu donas manĝojn. Budhana monaĥo ne petas almozojn; la donanto petas al la monaĥo aŭ monaĥino akcepti de la laikulo, por ke tiu rikoltu meriton.

³ "Sekvonta mondo" signifas sekvonta vivo, ĉi tiu mondo, ĉu en alia.

⁴ La reĝo de Morto estas Mara', kiel jam menciite. Sanghano (ano de la gemonaharo), kiu konscie praktikas la Dharmon, ne plu estas tuŝebla de malbono nek de morto; kvankam ties korpo certe mortos, tamen tio ne gravas al liberigito.

⁵ En tiu ĉi verso la Budho klare montras, ke estas eble mem korekti kaj forviŝi la rezulton de antaŭaj malbonaj agoj — se oni kovras ilin per grandaj bonoj. Se ne eblas kovri ĉiujn faritajn malbonojn, tamen oni povas mildigi la rezulton.

⁶ Budhismo ne neas la ekziston de ĉielo, sed ne kredas, ke ili estas eternaj. Pro tio Sanghano (monaĥo) ne strebu al renaskiĝo en iu ĉielo, sed al Nirvano.

175. Cignoj flugas laŭ la vojo de la suno kvazaŭ portataj de magiaj fortoj⁷. Saĝuloj estos kondukataj el tiu ĉi mondo kiam ili venkis Maraon kaj ties akompanularon.
176. Homo, kiu ofendis la leĝon de vereco kaj estas indiferenta al la alia mondo⁸, estas kapabla fari kian ajn malbonon.
177. Vere, avaruloj ne iros al pli bonaj vivstatoj; malsaĝuloj ne laŭdas donemon. La saĝulo ĝojas pro donemo, kaj poste li atingas feliĉan vivstaton.
178. Pli bona ol mond-regado, pli bona ol iro al ĉielo, pli bona eĉ ol regado de la universo estas la frukto de tiu homo, kiu eniris la riveron⁹.

⁷ La t.n. magiaj aŭ psikaj fortoj estas akireblaj de Arahatoj, sed magiaj fortoj ne estas la celo de budhana sanktulo — ili nur estas apud-produktaĵoj de lia strebado al perfekteco. Publika demonstrado de magiaj fortoj estas severe malpermesita de la Budho; kun kelkaj esceptoj en la pli frua tempo de sia misio, la Budho ne uzis magiajn fortojn por konvinki dubulojn.

⁸ La kredo je renaskiĝo en tiu ĉi aŭ ia alia mondo.

⁹ La "frukto" estas la bona rezulto de ekirado sur la vojo kondukanta al Nirvano. En la lingvo Pāli, oni komparas tiun ekiradon al eniro en riveron, kaj pro tio nomas ĝin "Sotapatti". La termino signifas "La atingo de la rivero je la unua fojo", kaj ĝi estas la unua paŝo al sankteco. La ekiranto ne plu renaskiĝos en malbonaj vivstatoj.

Ĉapitro 14

Buddha Vagga

La Budho

179. Tiu, kies venko ne povas denove ŝanĝiĝi al malvenko; tiu, en kies venko neniu en tiu ĉi mondo povas sin intermeti — per kia vojo vi povus konduki tiun ĉi ĉiosciantan, senvojan Budhon¹?
180. Tiu, kiun neniam deziro per ĝiaj katenoj kaj venenoj povas flankenkonduki — per kia vojo vi povus konduki tiun ĉi ĉiosciantan, senvojan Budhon?
181. La saĝuloj, kiuj praktikas koncentriĝon kaj envidon; kiuj ĝojas pro la paco de la menso kaj forlaso de la hejma vivado — tiajn atentemajn kaj perfektajn Budhojn eĉ la dioj tenas karaj².
182. Malofte oni naskiĝas kiel homa estaĵo³. Malofte oni ricevas la oportunon aŭskulti la Dharmon. Malofte aperas Budhoj en la mondo.
183. Ne faru ian ajn malbonon; kulturu la bonon; purigu la propran menson — tio estas la instruoj de la Budhoj⁴.
184. La pacienco estas la plej alta pentado. Nirvano estas superega, diras la Budhoj. Tiu, kiu vundas alian estaĵon, ne estas ermito. Tiu, kiu subpremas aliulon, ne estas ŝramano⁵.
185. Nek insulti nek vundi; sin konduti laŭ la regularo⁶; modereco en manĝoj; soleca vivado kaj vicleco en kulturado de noblaj pensoj — tio estas la instruoj de la Budhoj.

¹ Ĉar la Budho estas entute liberigita de ĉiuj memecaj deziroj, pasioj, inklinoj, kaj teorioj, neniu povas konduki lin sur alian vojon — for de la Dharmo.

² En aliaj tradukoj de la Dhammapado oni ofte legas anstataŭ "eĉ la dioj tenas karaj", "eĉ la dioj envias"— kio laŭ la senco ne estas erara.

³ Esti naskita kiel homo estas granda privilegio, ĉar nur kiel homo oni povas liberiĝi de la Sangsaro kaj atingi Nirvanon.

⁴ Tiu ĉi verso estas unu el la plej famaj inter budhanaj.

⁵ Ŝramano estas sanskrita termino; en Pāli ĝi estas Samana. Hinduaj, ĵainaj, kaj budhanaj asketuloj estis nomataj Ŝramanoj. La termino signifas personon, kiu liberiĝis de ĉiuj pasioj kaj vivas senhejman vivon.

⁶ Temas pri la "Vinajo", la regularo por budhanaj gemonahoj.

186. Eĉ ne per torento da or-pecoj oni povas akiri ĉiam daŭrantan kontentigon pro sens-plezuroj. Tiu, kiu scias, ke plezuroj havas nur mallongan daŭron kaj kaŭzas doloron⁷ — tiu estas saĝa homo.
187. Tiel bone sciante, la saĝa viro ne trovos ĝojon eĉ en ĉielaj plezuroj. La disĉiplo de la Plene Enlumigito [nur] ĝojas pro la detruo de ĉiuj [memecaj] deziroj.
188. Homoj ĉasataj de timo iras por rifuĝo al la montoj, arbaroj, arboj, kaj sanktejoj.
189. Ne! Tiaj rifuĝejoj ne estas sekuraj. Ne pro irado al tiaj lokoj kiel rifuĝo oni liberiĝas de suferado⁸.
190. Tiu, kiu iras por rifuĝo al la Budho, la Dharmo, kaj Sangho, klare perceptas la Kvar Noblajn Verojn:
191. La suferadon; la kaŭzon de la suferado; la forigon de la suferado; kaj la Noblan Okpartan Vojon kondukantan al la ĉesigo de suferado⁹.
192. Tio, verdire, estas la sekura rifuĝo. Tio, vere estas la supera rifuĝo. Prenante tiun rifuĝon, homo estas liberiĝonta de ĉiuj suferoj.
193. Malfacile trovebla estas homo kun granda saĝeco; tia homo ne estas naskata ĉie, sed kie ajn tia saĝulo estas naskita, tiu familio estas feliĉa¹⁰.
194. Feliĉa estas la naskiĝo de la Budhoj. Feliĉa estas la instruo de la nobla Dharmo. Feliĉa estas la unueco de la Sangho. Feliĉa estas la disciplino de la unuiĝintoj.

⁷ Ĉio, kio estas agrabla al ni, kaŭzas aŭ doloron aŭ sopiron al tio, kion ni perdis.

⁸ Oni ne miskomprenu tion, kion la Budho diras en la verso. La signifo estas, ke oni ne povas liberiĝi de suferado sole per irado al tiaj lokoj — se la prava mensostato mankas.

⁹ La Nobla Okparta Vojo estas: prava kredo [sed ne blinda kredo], prava kompreno, prava parolo, prava agado, prava vivrimedo, prava energio, prava koncentriĝo, kaj prava meditado.

¹⁰ En tiu ĉi verso oni parolas pri iu ajn Budho; Budhismo rekonas ne nur la historian Budhon Gaŭtamo, sed ankaŭ multajn aliajn en la pasinteco kaj en la estonteco. Theravada Budhismo rekonas nur 23 antaŭajn Budhojn kaj la sekvontan Budhon Maitrejo, sed Mahajana Budhismo rekonas multajn Budhojn el la pasinteco, nuno, kaj estonteco. En ambaŭ skoloj la venonta Budho Maitrejo, la Budho de Amema Bonuolo, estas komuna. La Budho Gaŭtamo estas la Budho de Kompato.

195. Tiu, kiu respektame salutas tiujn, kiuj meritas respekton — ĉu Budhojn, ĉu iliajn disĉiplojn, tiujn, kiuj venkis la obstaklojn kaj forigis doloron kaj lamentadon —
196. la merito de tiu, kiu respektame salutas tiujn pacemajn kaj sentimajn [monaĥojn], ne povas esti mezurata de iu ajn persono.

Ĉapitro 15

Sukha Vagga

Feliĉo

197. Feliĉe ni vivas sen malamo inter malamantoj; en la mezo de malamantaj homoj, ni loĝas sen malamo¹.
198. Feliĉe ni vivas en bona sano inter malsanuloj, en la mezo de malsanaj homoj ni loĝas en bona sano².
199. Feliĉe ni vivas sen avido inter avidemuloj; en la mezo de avidemaj homoj ni loĝas sen avidemo.
200. Feliĉe ni vivas — ni, kiuj nenion posedas. Kiel la dioj de la radiantaj regnoj, ni nutriĝas per ĝojo³.
201. Venko bredas malamon. La venkito vivas en doloro. Feliĉe vivas la pacemuloj, kiuj jam forlasis venkon kaj malvenkon.
202. Ne ekzistas pli detruema fajro ol avido, neniam krimo pli granda ol malamo. Ne ekzistas io pli doloriga ol la korpo, neniam feliĉo pli alta ol paco⁴.
203. Malsato estas la plej severa malsano. Korpo estas la plej doloriga kombinaĵo⁵. Bone komprenante tion kiel ĝi vere estas, la saĝulo, ekkonas, ke Nirvano estas la plej alta feliĉo.
204. Sano estas la plej valora posedaĵo. Kontento estas la plej granda trezoro. Sinceraj homoj estas la plej bonaj parencoj⁶.
205. Tiu, kiu gustis la aromon de soleco kaj la aromon de kvieteco, estas libera de timo kaj libera de makuloj, dum li gustas la aromon de la Dharmo.

¹ Bhikŝuo, kiu akiris pacon de menso, kapablas vivi en ĉiuj kondiĉoj — ekzemple, inter malbonaj homoj, danĝeraj bestoj, k.t.p.

² Laŭ Budhismo, multaj malsanoj estas la rezultoj de propraj malbonaj agoj, malkorekta vivmaniero, kaj ĉiuspekaj koruptaĵoj. La plej multaj malsanoj estas la rektaj sekvoj de malamo, avido, kaj iluzio.

³ Budhismo transprenis el Hinduismo ideojn pri dioj kaj pri la maniero, en kiu tiuj dioj vivas, nutriĝas, k.t.p.

⁴ Paco ĉi tie estas identa kun Nirvano, sed ĝi ankaŭ signifas pacon ĝenerale.

⁵ La kvin "Skandhoj" kiuj formas korpon: 1. materiaj kvalitoj; 2. sentoj; 3. perceptoj; 4. karmaj tendencoj; 5. konscio.

⁶ Kiu ajn homo, kiu estas sincera, estas preferinda al malsincera sang-parenco.

206. Bona estas la ekvido de Arjanoj⁷; asociiĝo kun ili estas ĉiam feliĉiga. Ne vidante malsaĝulojn, oni povas esti feliĉa.
207. Vere, tiu, kiu asociiĝas kun malsaĝuloj, suferas dum longa tempo. Asociiĝo kun malsaĝuloj estas ĉiam doloriga, same kiel asociiĝo kun malamiko. Feliĉa estas asociiĝo kun saĝuloj, same kiel asociiĝo kun parencoj.
208. Protio oni asociiĝu kun saĝulo, klerulo, pacienculo, obeemulo, kaj noblulo; oni devus asociiĝi kun tia virta kaj intelekta homo, kiel la luno sekvas la vojon de la steloj.

⁷ Arjanoj en Budhismo estas Nobluloj, Sanktuloj, Arahatoj —ne anoj de iu speciala raso aŭ popolo. Rasismo, kastismo, kaj naciismo estas kontraŭaj al la Dharmo; kaj kie ajn ĉi tiuj ekstremaĵoj penetris, la popolo aŭ popoloj sekvas ne la instruon de la Budho sed proprajn disordigitajn ideojn.

Ĉapitro 16

Piya Vagga

Korinklino

209. Tiu, kiu faras tion, kion oni devus eviti, kaj ne faras tion, kion oni devus fari, forlasas strebadon¹ kaj postkuras plezurojn — baldaŭ envios tiujn, kiuj penegas².
210. Ne estu ligata al tio, kio estas kara; ne estu ligata al tio, kio estas malkara. Ne vidi tion, kio estas kara, kaj vidi tion, kio estas malkara — ambaŭ estas dolorige.
211. Pro tio tenu nenion kara; ĉar perdo de tio, kio estas kara, estas malbona. Tiuj, kiuj tenas nenion kara kaj nenion malkara, estas liberaj de ligiloj.
212. El amo estiĝas doloro; el amo estiĝas timo. Tiu, kiu estas entute libera de amo, nek suferas nek timas³.
213. El korinklino estiĝas doloro; el korinklino estiĝas timo. Tiu, kiu estas entute libera de korinklino, nek suferas nek timas⁴.
214. El pasio estiĝas sufero; el pasio estiĝas timo. Tiu, kiu estas entute libera de pasio, nek suferas nek timas.
215. El ligiteco estiĝas sufero; el ligiteco estiĝas timo. Tiu, kiu estas entute libera de ligiloj, nek suferas nek timas.
216. El avido estiĝas sufero; el avido estiĝas timo. Tiu, kiu estas entute libera de avido, nek suferas nek timas.

¹ Strebado sur la Nobla Okparta Vojo.

² Tiuj, monaĥoj aŭ laikuloj, kiuj penegas progresi sur la Vojo anstataŭ okupiĝi je senvaloraj aferoj.

³ En la lingvoj Sanskrito kaj Pāli ekzistas diversaj nomoj por difini amon. En tiu ĉi verso oni parolas pri pasia amo. Amo al ĉiuj vivantaj estaĵoj sen escepto estas la vera senmemeca amo.

⁴ La Palia vorto "piya" estas iom malfacile tradukebla. En kelkaj anglaj tradukoj de la Dhammapado oni tradukas ĝin kiel "pleasure" ("The Sacred Books of the East", vol.10). Narada Thera tradukas ĝin kiel "affection" ("Dhammapada", Sajgono, 1963); tiu traduko estas la plej bona en la angla lingvo. "Korinklino" estas la plej proksima traduko en Esperanto.

217. Tiu, kiu posedas ambaŭ virton kaj envidon, kaj vivas laŭ la Dharmo, komprenante la Veroin⁵; kaj kiu plenumas siajn proprajn devojn — tiun homoj amas.
218. Tiu, kiu disvolvigas deziron por la Ne-esprimebla [Nirvano]; tiu, kies menso estas trankvila kaj ne katenita de mondaj plezuroj — tia persono estas nomata "kontraŭ-la-rivero-iranto".⁶
219. Viro, kiu longtempe forestis kaj revenas sekure — tiun la parencoj, amikoj kaj bondezirantoj bonvenigas hejmen.
220. Sammaniere, la bonaj agoj [rezultoj] bonvenigas tiun, kiu iris el tiu ĉi mondo al la sekvanta mondo, kiel oni bonvenigas karan parencon, kiu revenis hejmen.

⁵ T.e. la Kvar Noblaj Veroj pri suferado kaj ties forigo.

⁶ "Kontraŭ-la-rivero-iranto" estas tiu, kiu ne kuras kun la granda senscia homamaso, sed ekiras la Noblan Okpartan Vojon kondukantan al Nirvano.

Ĉapitro 17

Kodha Vagga

Kolero

221. Oni devus forlasi koleron; oni devus forlasi fieron; oni devus rompi ĉiujn ligilojn. Sufero ne tuŝas tiun, kiu ne estas ligita al menso nek korpo, kaj kiu estas senpasia.
222. Kiu ajn bridas koleron kvazaŭ ĝi estus ruliĝanta ĉeval-ĉaro, tiun mi nomas ĉaristo. Aliaj ĉaristoj estas nur bridil-tenantoj.
223. Venku koleron per amo. Venku malbonon per bono. Venku la avarulon per donemo. Venku la mensoganton per la vero.
224. Oni devus paroli la veron. Oni devus ne koleri. Oni devus doni eĉ el malmulto al tiu, kiu petas. Laŭ tiuj ĉi tri vojoj oni alproksimiĝas la diojn.
225. La saĝuloj, kiuj ne vundas aliajn estaĵojn, kaj kiuj estas memdisciplinitaj, iros al la Senmorta Stato¹; irinte tien, ili ne plu suferos.
226. La ofendoj² de homoj, kiuj [alie] estas ĉiam atentemaj, kiuj tage kaj nokte disciplinas sin kaj energie strebas al Nirvano, detruig³os.
227. Ho Atulo⁴ ! Jen malnova diraĵo — ne nur de ĵus hodiaŭ: "Oni riproĉas tiujn, kiuj silente sidas; oni riproĉas tiujn, kiuj multe parolas; kaj oni riproĉas tiujn, kiuj malmulte parolas". En tiu ĉi mondo ne ekzistas persono, kiun neniu riproĉas.
228. Neniam ekzistis, neniam ekzistos, nek ekzistas nun persono, kiu estas entute riproĉata aŭ entute laŭdata.
229. Observinte tagon post tagon, la saĝuloj laŭdas tiun, kiu vivas noblan vivon, estas inteligenta, kaj posedas scion kaj virton.
230. Kiu kuraĝus riproĉi tiun, kiu similas al pura oro ? Eĉ la dioj laŭdas tiun; Brahmo mem laŭdas tiun.

¹ La Senmorta Stato estas Nirvano, la finfina celo de religia strebado en Budhismo.

² Anstataŭ "ofendoj", oni povus legi "koruptaĵoj", sed neniam "pekoj", ĉar tiu tro kristana vorto ne troviĝas en Budhismo.

³ Sanktuloj aŭ Arahatoj estas preter bono kaj malbono; okaza, senintenca malbona ago ne portos rezultojn, ĉar la rezultoj de faritaj bonoj kovras ilin.

⁴ Atulo estas persona nomo.

231. Oni devus gardi sin kontraŭ malbonaj agoj fare de la korpo, kaj oni devus esti memregita en la korpo. Forlasante malbonan konduton de la korpo, oni devus esti de bona korpa konduto.
232. Oni devus gardi sin kontraŭ malbonaj agoj fare de la parolo, kaj oni devus esti atentema al parolo. Forlasante malbonan konduton de la parolo, oni devus ekzerci sin en bona parolo.
233. Oni devus gardi sin kontraŭ malbona konduto pere de la menso. Oni devus esti disciplinita en la menso. Forlasante malbonan konduton de la menso, oni devus esti de bona konduto en la menso.
234. Saĝuloj estas disciplinitaj en agoj; ankaŭ en parolo ili estas disciplinitaj. Saĝuloj, kiuj estas disciplinitaj en la menso, vere estas perfekte disciplinitaj.

Ĉapitro 18

Mala Vagga

Makuloj

235. Simila al velkinta folio vi nun estas. La komisiitoj de morto vizitas vin. Sur la sojlo de kadukiĝo vi nun estas. Provizo ankaŭ ne troviĝas por vi.
236. Faru insulon por vi mem; strebu konscie; fariĝu saĝa. Purigite de rusto kaj pasioj, atingos la ĉielan staton de la Arjanoj.
237. Via vivo nun alproksimiĝas la finon. Al la renkontiĝo kun morto vi nun ekiras. Ne troviĝas haltejo por vi apud la vojo. Ankaŭ nenia provizo troviĝas por vi.
238. Faru insulon por vi mem; strebu senhezite; estu saĝa. Purigite de rusto kaj pasioj, vi ne plu venos al naskiĝo kaj maljuniĝo.
239. Grade, iom post iom, de tempo al tempo, saĝa viro devus forigi siajn proprajn makulojn, same kiel forĝisto forigas la rekrementon de arĝento.
240. Same kiel la rusto deveninta de fero formanĝas ĝin mem, tiel la homo pro siaj propraj malbonaj agoj iros al malfeliĉaj vivstatoj.
241. Ne-recitado estas la rusto de religiaj doktrinoj; ne-ekzerciĝado estas la rusto de hejmuloj; maldiligenteco estas la makulo de beleco; malatentemo estas la difekto de gardisto.
242. Miskonduto estas difekto de virino. Avareco estas difekto de donanto. Difektoj vere estas ĉiuj malbonaj aferoj en ambaŭ la nuna kaj la sekvonta mondoj.
243. Pli granda difekto ol tiuj estas nescio, la plej granda difekto. Forlasinte tiun difekton, oni estas sendifekta, ho Bhikŝuoj!
244. Facila estas la vivo de senhontulo, kaj de tiu, kiu estas impertinenta kiel korvo, kalumnema, pretendema, aroganta kaj korupta.
245. Malfacila estas la vivo de modesta homo, kiu konstante serĉas purecon, kiu estas senliga, humila, pura en sia vivmaniero, kaj pripensema.
246. Kiu ajn en tiu ĉi mondo detruas vivon, mensogas, prenas tion, kio ne estas [libervole] donita, amindumas la edzinojn de aliaj viroj;

247. kaj la viro, kiu emas drinki ebriaĵojn¹; tiu homo elfosas sian propran radikon en tiu ĉi mondo.
248. Ho bona viro! Tiel ĉi vi sciu: "Ne facile regeblaj estas malbonaĵoj". Avidoj kaj vicoj ne kaŭzu al vi dumlonge mizeron.
249. Homoj donas laŭ ilia kredo kaj laŭ ilia plezuro. Kiu ajn envias la manĝojn kaj trinkaĵojn al aliaj personoj, ne havas pacon tage nek nokte.
250. Sed tiu, kiu entute tranĉos, elfosos, kaj detruos tiun senton, gajnos pacon en tago kaj en nokto.
251. Ne ekzistas fajro simila al pasio, nek demono simila al malamo, nek reto simila al iluzio, nek rivero simila al avido.
252. Facile videblaj estas la eraroj de aliuloj, sed treege malfacile videblaj estas la propraj eraroj. Kiel grenventumilo, oni ventokribras la erarojn de aliuloj, sed siajn proprajn erarojn oni kaŝas, kiel ruza birdkaptisto kaŝiĝas malantaŭ branĉoj.
253. Tiu, kiu vidas la erarojn de aliuloj kaj ĉiam koleras — la koruptaĵoj de tia persono kreskas. Tiu estas longe for de la detruo de siaj propraj eraroj.
254. En la aero ne ekzistas vojo. Ekstere [de la Dharmo] ne ekzistas Arjanoj. La homaro ĝuas obstaklojn². La Tathagatoj estas liberaj de obstakloj.
255. En la aero ne ekzistas vojo. Ekstere [de la Dharmo] ne ekzistas Arjanoj. Ne ekzistas kombinaĵoj, kiuj estas eternaj. Ne ekzistas malfirmeco en la Budhoj.

¹ Tio inkludas uzon de drogoj kiel LSD, meskalino, opio, kanabo, k.t.p. La kvina precepto diras, "Mi promesas abstini de drinkaĵoj kaj drogoj". La nuntempa uzado de drogoj por atingi ekstazojn, au kiel "helpon" al meditado, estas kontraŭ Budhismo kaj Jogo.

² La obstakloj estas la ofendoj, pasioj, kaj malbonaj agoj, kiuj malhelpas se oni volas trovi baldaŭan liberiĝon de la Rado de Vivo kaj Morto.

Ĉapitro 19

Dhammattha Vagga

La Justulo

256. Li ne estas justa, ĉar li rapide arbitras kazojn¹. Saĝa viro devus unue esplori ambaŭ la pravan kaj la falsan.
257. Inteligenta persono, kiu ne false gvidas aliulojn, sed laŭleĝe kaj senpartieme, kiu estas gardanto de la leĝo, estas prave nomata "persono, kiu estas justa".
258. Oni ne estas klera homo, se oni multe parolas. Tiun, kiu estas sekura, sen malamo kaj sentima, oni nomu klera.
259. Oni ne estas sperta en la Dharmo sole ĉar oni multe parolas pri ĝi. Tiu, kiu aŭdis malmulte, sed vidas mense la Dharmon, kaj tiu, kiu ne malatendas la Dharmon, estas vere sperta en la Dharmo.
260. Oni ne estas Thero² ĉar la hararo estas griza. "Matura en aĝo, vane maljuna", li estas nomata.
261. En kiu troviĝas vero, virto, senperforto, sin-retenado kaj memregado, tiu saĝa viro estas purigita de malpuraĵoj; li estas prave nomata Thero.
262. Nek pro elokventeco, nek pro bona aspekto, fariĝas homo bonkora se li estas ĵaluza, memeca, kaj trompema.
263. Sed en kiu tiaj tendencoj estas entute tratanĉitaj, elradikitaj, kaj estingitaj, tiu saĝa homo, kiu estas purigita de malamo, estas prave nomata bonkorulo.
264. Ne pro razita kapo fariĝas mensogema kaj sendisciplina viro Samano³. Ĉu viro, kiu ankoraŭ estas plena de deziroj kaj avido, povus esti Samano ?

¹ En juĝejo aŭ tribunalo.

² En Theravada Budhismo, monaĥo, kiu estas dum dek jaroj membro de la Sangho (ordeno) ekde sia plena ordenigo kiel bhikŝuo, rajtas nomiĝi Thero — t.e. "pliaĝulo". En Mahajana Budhismo oni nomas ilin sanskrite "Sthavira", kio havas la saman signifon. Post dudek jaroj kiel bhikŝuo oni aldonas "mahā" — t.e. "granda"

³ Samano estas hinda asketulo, ĉu budhana, ĉu apartenanta al Brahmanismo. En Sanskrito: Śramana.

265. Tiu, kiu entute forigis malbonan agadon, ambaŭ malgrandan kaj grandan, tiu estu prave nomata Samano, ĉar li jam venkis ĉiun malbonon.
266. Oni ne estas Bhikŝuo nur ĉar oni almoziras; [sed] per la obeado de la tuta regularo⁴ oni certe fariĝas Bhiksuo⁵.
267. Tiu, kiu estas super ambaŭ bono kaj malbono, kies konduto estas senriproĉa, kiu komprenante vivas en tiu ĉi mondo, tiu prave estas nomata Bhikŝuo.
268. Ne pro silentado fariĝas tiu, kiu estas malsprita kaj senscia, Muni'⁶; sed tiu saĝa homo, kiu kvazaŭ tenante paron da pesiloj, elektas la plej altan bonon kaj forigas malbonon, estas [prave] nomata Muni'.
269. Pro tiu ĉi kaŭzo li estas nomata saĝulo. Tiu, kiu komprenas ambaŭ mondojn⁷, estas pro tio nomata Muni'.
270. Li ne estas Arjano ĉar li perfortas vivantajn estaĵojn pro sia senperforteco al ĉiuj vivantaj estaĵoj li estas nomata Arjano.
271. Ne nur pro moraleco kaj asketismo, nek pro multlernado, eĉ nek pro evoluiĝo de menskoncentrigo, nek pro soleco...
272. Pensante, "Mi ĝuas la beatecon de senligeco, kio ne estas ŝatata de mondano"... Ne kun tiuj [ideoj] restu kontentaj, ho Bhikŝuoj sen atingi la estingon de deziroj⁸.

⁴ La regularo estas la Vinajo. La Theravado havas 227 regulojn por la Bhikŝuoj kaj 400 por la Bhikŝuinoj. La Vinajo de la Mahajano enhavas 253 regulojn, sed ili estas forte modifitaj en ekzemple Japanujo.

⁵ Bhikŝuo (en Sanskrito "bhiksu", en Pali "bhikkhu") litere signifas "almozulo"; sed en Budhismo la termino havas pli subtilan signifon, precipe ĉar la budhana monaĥo ne petas almozojn — la donanto petas al la monaĥo akcepti ion de li, por ke li rikoltu meriton.

⁶ Muni' estas sanskrita vorto, sed sama en Pāli; ĝenerale oni tradukas ĝin per "saĝulo", sed ne temas pri ordinara saĝulo. La termino estas uzebla nur por granda spirita saĝulo, aŭ budhana aŭ apartenanta al la hindu-religio. Gotama Budho estas ofte nomata Sakjamini — t.e. "la saĝulo el la Sakja tribo".

⁷ "Ambaŭ mondoj" estas la nuna kaj estonta vivoj.

⁸ Anstataŭ "deziroj" oni povus legi "koruptaĵoj".

Ĉapitro 20

Magga Vagga

La Vojo

273. La plej bona inter la vojoj¹ estas la Okparta Vojo². La plej bona inter la veroj estas la Kvar Veroj³.
Senligeco estas la plej bona stato. La plej bona inter la dupiedaj estaĵoj estas tiu, kiu havas okulojn por vidi⁴.
274. Tiu ĉi estas la sola vojo; ne ekzistas alia [pli perfekta], kiu kondukas al la puriĝo de la vizio. Sekvu tiun ĉi vojon, je la konfuziĝo de Mara'.
275. Ekirante tiun ĉi vojon, vi faros finon al suferado. Lerninte la forigon de la dornoj⁵, mi instruis al vi la Vojon.
276. Vi mem devas klopodi; la Tathagatoj estas nur instruantoj.
La meditemuloj, kiuj ekiras la Vojon, estas liberiĝintaj de la ligiloj de Mara'.
277. Ĉiuj kondiĉigitaj aĵoj pereos; se oni tion klare ekkonas, oni naŭziĝas pri doloro — tio ĉi estas la Vojo al Pureco.
278. Dolorigaj estas ĉiuj kondiĉigitaj aferoj; se oni tion klare ekkomprenas, oni naŭziĝas pri doloro — tio ĉi estas la Vojo al Pureco.
279. Ĉiuj Skandhoj⁶ estas ne-animaj; se oni tion ekkomprenas, oni naŭziĝas pri doloro — tio estas la Vojo al Pureco.
280. La neaganta maldiligentulo, kiu ne strebas kiam li devus strebi — tiu, kvankam juna kaj forta, kiu estas malagema, kies volo kaj menso estas malfortaj — ne perceptos la Vojon al Pureco.
281. Atentema en sia parolo, bone sinretenema en la menso, viro neniam faru ian malbonon per sia korpo. Li purigu tiujn tri vojojn de agado kaj gajnu la vojon efektivigotan de saĝuloj.

¹ La diversaj religioj aŭ filozofioj.

² La Nobla Okparta Vojo: vidu version 191 kaj piednoton 9.

³ La Kvar Noblaj Veroj, sur kiuj la tuta Dharmo de la Budho estas bazita; vidu enkondukon.

⁴ "Okulojn por vidi": alivorte, kiu kapablas vidi la veron en la instruoj de la Budho.

⁵ La malhelpaĵoj, kiujn oni renkontas sur la Vojo estas ofte nomataj "dornoj".

⁶ La Skandhoj estas tio, kio en Budhismo formas la personecon.

282. Vere, el meditado estiĝas scio. Sen meditado, scio paliĝas. Konante tiun ĉi duopan vojon de gajno kaj perdo, oni konduku sin tiel, ke la scio kresku !
283. Forhaku la arbaron⁷, sed ne verajn arbojn. Danĝero⁸ venas el la arbaro. Forhakante ambaŭ la arbaron kaj arbetojn, estu sentimaj, ho, Bhikŝuoj !
284. Tiom longe, ke la plej eta pasio en viro por virinoj ne estas detruiĝinta, tiom longe estos lia menso ligita, kiel la bovido, kiu trinkas lakton, estas ligita al ĝia patrino.
285. Per viaj propraj manoj tranĉu vian korinklinon, kvazaŭ ĝi estus aŭtuna lotuso. Kulturu la veran vojon al paco. Nirvano estas klarigita de Sugato⁹.
286. "Ĉi tie mi loĝos dum la pluvsezono; tie mi loĝos dum la aŭtuno kaj somero"— tiel la stultulo kontemplas, kaj ne pensas pri sia morto¹⁰.
287. La dorloteman viron, kies menso estas okupata pri infanoj kaj brutaro, la morto kaptos kaj forportos, same kiel diluvo forportas dormantan vilaĝon.
288. Filoj estas nenia helpo, nek la patro, nek la parencoj; ne troviĝas protekto inter la parencoj por homo, kiu estas mortanta.
289. Kompreninte tiun fakton, la virta kaj saĝa homo rapide purigu la vojon, kiu kondukas al Nirvano !

⁷ "Arbaro" estas simbolo por la ĉefaj homaj pasioj, nome: avido, malamo, kaj iluzio.

⁸ "Danĝero" signifas la ordinarajn aŭ malgrandajn pasiojn.

⁹ Sugato (sanskrite "Sugata") estas alia nomo de la Budho; oni povus traduki ĝin "Tiu, kiu estas feliĉa" aŭ "Tiu, kiu bonfartas".

¹⁰ La plej multaj homoj vivas kvazaŭ ili neniam mortos. Eĉ en maljuneco ili estas avidaj al posedaĵoj, heredaĵoj, mono, k.t.p., kaj esperas vivi dum jarcentoj, forgesitaj de la morto —sed la morto ne estas forgesema !

Ĉapitro 21

Pakinnaka Vagga

Diversaĵoj

290. Se oni per la rezigno de malgranda feliĉo povas gajni pli grandan, la saĝa homo rezignu la malgrandan feliĉon kaj gajnu la pli grandan¹.
291. Tiu, kiu deziras sian propran feliĉon, kaŭzante suferon al alia vivanta estaĵo, ne estas liberigita de malamo, sed estas ankoraŭ katenita de malamo.
292. Tio, kion oni devus fari, ne estas farata; kaj tio, kion oni devus ne fari, estas farita. La koruptaĵoj de homoj, kiuj estas fieraj kaj senatentaj, amasiĝas.
293. Tiuj, kiuj ĉiam energie praktikas atentemon je la korpo — kiuj ne sekvas tion, kion oni devus ne fari, kaj konstante faras tion, kion oni devus fari — en tiaj atentemaj kaj pripensemaj homoj la koruptaĵoj finiĝos.

¹ Kvankam la verso estas sufiĉe klara en si mem, tamen estus eble helpe al iuj legantoj mencii, ke la verso temas pri la ofte tre malfacila vivo de hejmulo, la "malgranda feliĉo", kompare al la libera, senliga vivo de monaĥo (aŭ monaĥino) en la budhana ordeno (Sangho). Ĉar la tuta Dhammapado estas ĉefe direktita al la gesanghanoj (gemonaĥoj), ĉi tiu klarigo estas prava; sed la Dhammapado ankaŭ estas granda vivkondukilo por la multe okupata laikulo, kiu ne havas tempon por legi kaj profunde studi la Dharmon; ĝuste pro tio, la Dhammapado fariĝis tre populara inter la budhanaro en la oriento kaj en la okcidento. Vidu la enkondukon.

294. Murdinte la patrinon kaj la patron, kaj krom ili ankaŭ du militistajn reĝojn, kaj detruinte la landon, inkluzive la impostoficiron — senkulpa restas la Brahmano.²
295. Murdinte la patrinon kaj la patron, kaj krom ili du brahmanajn reĝojn, kaj detruinte la danĝeran vojon — senkulpa restas la Brahmano.
296. Bone vekiĝintaj estas la disĉiploj de Gotamo; tage kaj nokte ili meditas pri la Budho.
297. Bone vekiĝintaj estas la disĉiploj de Gotamo; tage kaj nokte ili meditas pri la Dharmo.
298. Bone vekiĝintaj estas la disĉiploj de Gotamo; tage kaj nokte ili meditas pri la Sangho.
299. Bone vekiĝintaj estas la disĉiploj de Gotamo; tage kaj nokte ili meditas pri la korpo.
300. Bone vekiĝintaj estas la disĉiploj de Gotamo; tage kaj nokte ili praktikas senperfortecon.
301. Bone vekiĝintaj estas la disĉiploj de Gotamo; tage kaj nokte ili ĝojiĝas pro meditado.
302. Malfacila estas rezignado³. Malfacile estas ĝojiĝi pro ĝi. Malfacila kaj doloriga estas hejma vivado. Malfacile estas asociiĝi kun

² Tiu ĉi verso kaj la sekvanta estas esprimitaj en simbola lingvo; do oni ne kredu, ke la Budho konsentis al murdoj. Laŭ la komentarioj pri la Dhammapado, la du enigmaj versoj havas la jenajn signifojn: (1) "patrino" simbolas pasion; (2) "patro" estas fiero; (3) la "du militistajn reĝojn" simbolas heretikajn doktrinojn; (4) "la lando" (kaj ĝia loĝantaro) reprezentas sensplezurojn; (5) "la impostoficiro" estas soifo aŭ volo al vivo; (6) la "danĝera vojo" estas la vojo plena de duboj kaj obstakloj. La Brahmano reprezentas Arahaton (sanktulon). Pluraj komentarioj pri la Dhammapado ekzistas ambaŭ en orientaj kaj en okcidentaj lingvoj. Al la unuaj eŭropaj Palilogoj tiuj du versoj kaŭzis multe da cerbumado, akrajn diskutojn, kaj vastan korespondadon. Kristanaj misiistoj uzis la versojn por senkreditigi Budhismon en la okcidento kaj por kolekti monon por la konvertado de la "paganaj budhanoj". Theravadanoj ankoraŭ lernas parkere la Dhammapadon en la lingvo Pali.

³ Temas pri rezignado de la hejma vivo. La Budho kaj liaj ĉefaj disĉiploj ĉiam avertis novajn aspirantojn kontraŭ la senhejma vivo de Bhikŝuo. Nur en maloftaj kazoj oni tuj ordenigis aspirantojn; la plej multaj inter ili devis trapasi periodon de noviceco, kio ĝenerale daŭris dum kvin jaroj aŭ pli, dependante de aĝo kaj lerteco. Neniu povas fariĝi Bhikŝuo sub la aĝo de 20 jaroj; ĝis tiu "plenkreskiĝo" li estas nur ŝramanero (novico).

malkonkordaj personoj. Malfacila estas la vivo de Bhikŝuo; pro tio neniu fariĝu [facilanime] Bhikŝuo; ne estu serĉanto al doloro!

303. Tiu, kiu estas plena de konfido kaj virto, kaj posedanto de famo kaj de riĉaĵoj — li estas ĉie honorigata, en kiu ajn lando li restadas.
304. Bonaj homoj brilas el la distanco kiel la Himalaja montarego; malbonaj homoj, kvankam proksimaj, ne estas videblaj — ili estas kvazaŭ sagoj pafitaj dum nokto.
305. Tiu, kiu sidas sola, ripozas sola, iras sola, kaj en soleco regas sin mem — tiu ĝuas restadon eĉ en ĝangalo.

Ĉapitro 22

Niraja Vagga

Purgatorio

306. La parolanto de malvero renaskiĝos en purgatorio¹, kaj ankaŭ tiu, kiu faras malbonan agon sed diras, ke li ne faris. Post la morto ambaŭ estos egalaj; ili estos malbonfarantoj en la sekvonta mondo².
307. Multaj viroj, kies ŝultroj estas kovrataj de la flava robo³ estas de malbonaj tendencoj kaj senbridaj; tiuj malbonfarantoj renaskiĝos pro ilia malbonfarado en purgatorio.
308. Pli bone estas engluti ruĝ-varmegan feran bulon similan al flamanta fajro, ol esti senmorala kaj senbrida persono, nutriĝante per la almozoj oferitaj de hejmuloj.
309. Kvar malfeliĉaj aferoj okazos al la senatenta viro [aŭ virino], kiu adultas: malbona reputacio, maltrankvila dormo, trie riproĉoj, kaj kvare purgatorio.
310. Adultuloj akiros malmeriton kaj malbonan destinon. Mallonga estas la plezuro de timigitaj viro kaj virino. La reĝo⁴ severe punos ilin. Pro tio, neniu adultu kun la edzino de aliulo.
311. Same kiel la herbo kusa, malĝuste prenita, kaŭzas vundon en la mano, tiel ankaŭ la monaĥeco, malĝuste vivata, kaŭzas renaskiĝon en malfeliĉa stato.
312. Ia ajn maldeca ago, ia ajn korupta praktiko, vivo de dubinda sankteco — neniu inter ili havas bonan rezulton.
313. Se io estas farenda, faru ĝin. Faru ĝin energie! Maldiligenta monaĥo nur pli kaj pli disĵetas polvon.
314. Pli bone estas ne fari intence malbonan agon, ĉar ĝi turmentos la farinton. Pli bone estas fari bonan agon, post kio oni ne bedaŭros.

¹ La sanskrita kaj pālġa termino por purgatorio estas "Niraja", sed litere ĝi signifas "la elirejo" aŭ "la malbona vojo" kaj estas ofte tradukata kiel "infero". En Budhismo nenio krom la Nirvano estas eterna: nek ĉielo nek "infero"; pro tio ne ekzistas infero en la kristana signifo de la termino. La plej taŭga termino estas "purgatorio" — dumtempa mizera stato, ĉu fizika ĉu psika.

² Sekvonta vivo ie ajn en la universo.

³ La flava robo de la Theravadaj Bhikŝuoj estas en Pāli nomata Ĉivara.

⁴ Anstataŭ "reĝo" oni povus legi "aŭtoritatuloj" aŭ la "leĝo".

315. Gardu vin interne kaj ekstere, kiel oni gardas limurbon. Ne perdu oportunon, ĉar tiuj, kiuj perdas oportunon, bedaŭros kiam ili renaskiĝos en malfeliĉa stato.
316. Tiuj, kiuj hontas pro tio, pro kio ili ne bezonas honti, kaj ne hontas pro tio, pro kio ili devus honti, [sed] akceptas falsajn vidpunktojn, iros al malfeliĉa stato.
317. Tiuj, kiuj timas kiam ili ne bezonus timi, kaj ne timas kiam ili devus timi, [sed] akceptas falsajn vidpunktojn, iros al malfeliĉa stato.
318. Tiuj, kiuj imagas erarojn en la seneraro, kaj perceptas nenian eraron en tio, kio estas erara, [sed] akceptas falsajn vidpunktojn, iros al malfeliĉa stato.
319. Tiuj, kiuj konas erarojn kiel erarojn, kaj la ĝuston kiel ĝuston, kaj akceptas pravajn vidpunktojn, iros al benita stato.

Ĉapitro 23

Nāga Vagga

La Elefanto

320. Same kiel elefanto kontraŭstaras sagojn pafitajn de arko, tiel mi toleru insultojn. Vere, la plej multaj homoj estas sendisciplinaj.
321. Oni kondukas la dresitajn [elefantojn aŭ ĉevalojn] al la kunveno, kaj la reĝo rajdas dresitan beston. La plej bonaj inter la homoj estas la disciplinitaj, kiuj povas toleri insultojn.
322. Bonegaj estas dresitaj muloj; samaj estas la bone breditaj ĉevaloj de Sindho¹ kaj noble denthavaj elefantoj. Sed multe pli bona estas la homo, kiu memdiscipliniĝas.
323. Certe, neniam oni povus per tiuj bestoj atingi la ne-surpaŝitan landon², kiel faras la monaĥo per sia bone regita kaj konkerita memo.
324. La neregebla kaptita elefanto nomata Dhanapālako, malgraŭ ĝia fluanta salivo, manĝas eĉ ne peceton, ĉar ĝi sopiras al la elefantarbaro³.
325. La malsaĝulo, kiu estas dormema kaj manĝema, kaj kiu ruliĝas tien kaj reen kiel granda porkino, kiu nutriĝas per manĝaĉoj, estas ĉiam denove renaskiĝonta⁴.
326. Pli frue tiu ĉi menso migris kien ajn plaĉis al ĝi kaj kliniĝis kiel ĝi deziris. Sed ekde hodiaŭ mi regos ĝin entute per atentemo, same kiel elefantrajdisto regas la furiozan beston.
327. Ĝoju pro atentemo. Gardu vian menson. Forlasu la malbonan vojon, kiel elefanto fiksita en la koto.
328. Se vi renkontiĝas kun prudenta akompananto, kiu taŭgas por vivi kun vi, kaj kiu estas bonkondukata kaj saĝa, asociiĝu kun li. [Sed] ĝoje kaj atente venku ĉiujn danĝerojn.

¹ Sindho estas rivero kaj provinco en la nuna Pakistanio.

² La ne-surpaŝita lando: la Nirvano.

³ En Budhismo la elefanto estas simbolo por forto kaj toleremo. La Bodhisatvo, la posta Budho Gaŭtama, aperis en sonĝo al la reĝino Maja-devi en formo de elefanto.

⁴ Tre supozeble kiel vera porko aŭ porkino! Renaskiĝo kiel besto, spirito, diaĵo, aŭ eĉ demono estas akceptata en Budhismo — ne kiel dogmo, sed kiel ebleco.

329. Se vi ne trovos prudentan, bonkondutan, kaj saĝan akompananton, tiam vi, same kiel reĝo, kiu forlasas sian venkitan landon, vivu sole en la arbaro⁵.
330. Pli bone estas vivi solece, ol asociiĝi kun malsaĝulo. Oni vivu solece sen fari malbonajn agojn, senzorge kiel la elefanto en ĝangalo.
331. En tempo de bezono, estas agrable havi amikojn. Agrable estas esti kontenta kun kion oni havas. Agrabla estas merito⁶ kiam la vivo alproksimiĝas la la fino. Agrabla estas la forigo de ĉia sufero.
332. Agrable estas en tiu ĉi mondo servi la patrinon. Agrable ankaŭ estas servi la patron. Agrable estas servi Samanojn⁷. Agrable estas servi Arahatojn.
333. Agrabla estas virta vivado ĝis maljuneco. Agrabla estas firme fondita konfido. Agrabla estas la akiro de saĝeco. Agrable estas deteni sin de malbonaj agoj.

⁵ Kiel ermito

⁶ Merito amasita dum vivo de bonaj agoj, helpemo, donemo, k.t.p.

⁷ Asketuloj de kiu ajn religio.

Ĉapitro 24

Tanhā Vagga

Soifo

334. La soifo de homo, kiu amas vivi senpripense, kreskas kiel grimpplanto. Li saltas de vivo al vivo kiel frukto-amanta simio en la arbaro.
335. Kiu ajn persono en tiu ĉi mondo estas venkita de la soifo¹, en tiu kreskas doloro kiel tiu kaŭzata de la akra herbaĵo Birana'.
336. Kiu ajn en tiu ĉi mondo venkas la vulgaran avidon, de tiu falos doloro kiel akvogutoj falas de lotusfloro.
337. Tion ĉi mi diras al vi: bonan ŝancon al vi, kiuj ĉi tie kunveniĝis ! Elfosu la radikon de la soifo same kiel oni elfosas la dolĉan radikon de la herbaĵo Birana'. Ne permesu, ke Mara'² denove venku vin kiel superakvego frakosas kanojn.
338. Simile al forhakita arbo, kies radikoj restas sendamaĝaj kaj denove burĝonos, tiel ankaŭ latentaj avidoj denove burĝonos, se ili ne estas elradikitaj.
339. Se en iu ajn persono la tridek ses riveroj [avidoj], kiuj fluas al agrablaj pensoj, estas fortaj, la miskondukita viro estas forportata de siaj torentaj kaj pasiaj pensoj.
340. Riveroj fluas ĉien. La grimpplanto³ starante burĝonas. Se vi vidas la burĝonantan grimpplanton, fortranĉu ĝin per saĝeco ĉe la radikoj.
341. En la estaĵoj stariĝas plezuroj, kiuj rapidegas al sentobjektoj, kaj tiuj estaĵoj estas ligitaj de avido. Sopirante al feliĉo, ili serĉas feliĉon. Vere, tiaj homoj denove iros al naskiĝo kaj morto.
342. Homoj kaptitaj en siaj avidoj estas teruritaj kiel kaptita leporo. Firme tenitaj per katenoj kaj ligiloj, dum longa tempo ili denove spertos suferon.
343. Homoj kaptitaj en siaj pasioj estas teruritaj kiel kaptita leporo. Pro tio la Bhikŝuo, kiu deziras sian propran senpasiecon, devus forigi avidon.

¹ T.e. avido al vivo, sensplezuroj, k.t.p.

² Mara' estas la Tentulo en Budhismo, ankaŭ nomata la reĝo de morto.

³ Riveroj kaj grimpplantoj signifas avidojn.

344. Kiu ajn persono sen deziroj trovas plezuron en la ĝangalo kaj, kvankam liberiĝinta de la deziro al la hejma vivado, reiras al tiu hejma vivado — venu kaj rigardu tiun ĉi personon! Liberiĝinte, li rekuras en sklavecon.
345. Tio, kio estas farita el fero, ligno, aŭ kanabo, ne estas forta ligilo, diras la saĝuloj. Sopiroy al gemoj, ornamaĵoj, infanoj kaj edzinoj estas multe pli forta ligilo.
346. Tiu ligilo estas forta, diras la saĝulo. Ĝi malsuprentiras; ĝi estas fleksebla kaj malfacile malbindebla. Eĉ ĝin la saĝulo povas fortranĉi; kaj li forlasas la mondon sen sopiri reen, rezignante sensplezurojn.
347. Homoj, kiuj estas sklavoj de pasioj, refalos en la riveron, kiel araneo kuras en la araneaĵon, kiun ĝi mem ŝpinis. Ankaŭ tion ĉi fortranĉas la saĝulo; kaj li migras sensopire, liberiĝinta de ĉiuj suferoj.
348. Rezignu la pasinton! Rezignu la nunon! Rezignu la estonton; Transirante la alian bordon de la ekzisto kun liberiĝinta menso, ne plu suferu naskiĝon kaj morton.
349. Se viro estas maltrankviligita per duboj, kaj ekstreme pasia, kaj ties pensoj estas direktataj nur al ŝatataj aferoj, la avido kreskos en li pli kaj pli. Vere, li plifortigas siajn ligilojn.
350. Tiu, kiu ĝojiĝas pro subpremo de malbonaj pensoj, kaj meditas pri la abomeno de la korpo⁴, kaj ĉiam estas atentema, estas la homo, kiu faras finon al avido kaj tranĉos la ligilojn de Mara'.
351. Tiu, kiu atingis la celon⁵, kaj kiu estas sentima, senavida, kaj senpasia, eltiris la dornojn⁶ el la vivo. Tiu ĉi estas ties lasta korpo⁷.
352. Tiu, kiu estas senavida kaj komprenanta, kiu estas klera en etimologio kaj terminoj, kiu konas la vicon de la literoj, estas nomata portanto de la lasta korpo; tiu, kiu havas profundan saĝecon; tiu estas granda homo⁸.

⁴ Budhanaj monaĥoj havas diversajn meditadoobjektojn. Unu inter la plej malfacilaj estas meditado pri la korpo, preferinde korpo de mortinto en stato de iom-post-ioma dissolviĝo.

⁵ T.e. la Arahateco, aŭ la dumviva Nirvano.

⁶ Temas pri obstakloj, malpuraĵoj de la menso, kaj avidoj.

⁷ Iu, kiu atingis Arahatecon, ne plu renaskiĝos ie ajn.

⁸ Arahato.

353. Ĉion m venkis; ĉion mi ekkonis. De ĉio mi estas liberiĝinta; ĉion mi rezignis. Entute absorbata mi estas en detruo de avidoj. Ĉar mi komprenas ĉion en mi mem, kiun mi povus nomi mia instruanto?⁹
354. La donaco de la Dharmo estas supera al ĉiuj aliaj donacoj. Laodoro de la Dharmo estas supera al ĉiuj aliaj odoroj. La plezuro de la Dharmo estas supera al ĉiuj aliaj plezuroj. Tiu, kiu detruis avidon, venkas ĉiujn suferojn.
355. Riĉaĵoj ruinas la stultulon, sed ne la homojn, kiuj serĉas Nirvanon. Pro avidemo al riĉaĵoj, la malsaĝa homo ruinos sin mem, kiel aliulojn.
356. Herbaĉoj estas la veneno de la kampoj; pasio estas la veneno de la homaro. Tial tio, kion oni donas al senpasiuloj, portos riĉan frukton¹⁰.
357. Herbaĉoj estas la veneno de la kampoj; malamo estas la veneno de la homaro. Tial tio, kion oni donas al homoj liberaj de malamo, portos abundan frukton¹¹.
358. Herbaĉoj estas la veneno de la kampoj; iluzio estas la veneno de la homaro. Tial tio, kion oni donas al homoj liberaj de iluzioj, portos abundan frukton.
359. Herbaĉoj estas la veneno de la kampoj; avido estas la veneno de la homaro. Tial tio, kion oni donas al homoj liberaj de avido, portos abundan frukton.

⁹ Laŭ la legendo, la Budho elparolis tiujn vortojn post sia Enlumiĝo. Al ordinaraĵ okcidentanoj tiu diraĵo povas ŝajni iom fanfarona, sed ne al hinduoj. Oni pli facile akceptas faktojn en la Oriento ol en la Okcidento. Dum mia restado en Hindujo, mi ofte renkontiĝis kun hinduaj joguloj, kiuj tute serioze proklamis, ke ili kaj Dio estas Unu; ne, ke ili estas Dio mem aŭ eĉ, ke ili havas Dion en iliaj manoj. La pli kaj malpli piaj hinduaj disĉiploj de tia jogulo tute ne miras pri la diraĵo de ilia "dia majstro" (en Sanskrito kaj la nuna Hindi nomata "Gurudev"), sed ĝojis pri lia sukceso.

¹⁰ Anstataŭ "frukton" oni povas legi "meriton". Bonaj aŭ malbonaj agoj rezultos en merito aŭ malmerito.

¹¹ La homoj liberaj de malamo, iluzioj, k.t.p. estas la strebemaj almozirantaj Bhikŝuoj aŭ Bhikŝuinoj. (sanskrite "Bhikṣuṇi" — t.e. budhana monaĥino).

Ĉapitro 25

Bhikku Vagga

La Monaĥo

360. Bona estas sinreteno en vivantaj estaĵoj. Bona estas sinreteno je la oreloj; bona estas sinreteno je la okuloj; bona estas sinreteno je la lango;
361. Bona estas sinreteno je agoj; bona estas sinreteno je parolo; bona estas sinreteno en la menso; bona estas sinreteno en ĉio. La monaĥo, kiu estas sinretenanta, estas libera de suferado.
362. Tiu, kiu estas regita je manoj kaj peidoj, en siaj parolo kaj pensoj; tiu, kiu ĝojas en meditado kaj estas egalanima; tiu, kiu estas sola kaj kontenta — tiun mi nomas Bhikŝuo.
363. La Bhikŝu', kiu estas memregita je sia lango kaj saĝe parolas, kiu ne fanfaronas, kiu klarigas la signifon¹ kaj la Dharmon — liaj vortoj estas dolĉaj.
364. La Bhikŝu', kiu vivas laŭ la Dharmo, kiu ĝojas pro la Dharmo, kiu meditas pri la Dharmo, bone memoras la Dharmon; li neniam forlasos la veran Dharmon.
365. Li ne malŝatu tion, kion oni donis al li [kiel almozaĵon], nek li enui aliajn monaĥojn. La Bhikŝu', kiu envias aliulojn, ne akiros superan Samadhi'².
366. Bhikŝuo, kiu nur iomete ricevis sed ne malŝatas tion, kion li ricevis — lin eĉ la dioj laŭdas, se lia vivo estas [samtempe] pura, kaj se li ne estas maldiligenta.
367. Tiu, kiu ne identiĝas kun la "MI" kaj "MIA", kaj ne zorgas pri io, kion li ne havas — vere tiu estas [prava] Bhikŝuo.

¹ La signifon de la Kvar Noblaj Veroj pri suferado kaj ties ĉesigo.

² Tiun ĉi terminon oni ofte simple tradukas per "meditado", sed ĝi estas multe pli ol tio. I.a. ĝi estas tre profunda meditado, unuiĝo kun la objekto de la meditado, kaj la stato, en kiu oni fariĝas budho aŭ arahato. En Hinduismo, "Samadhi" ankaŭ signifas unuiĝon kun Brahman', la nepersona Dio de la Vedanta filozofio. Bv. noti, ke Brahmo estas la persona Dio kaj Brahman' lia neŭtra aspekto, sed ambaŭ ne partoj de Budhismo. Brahman' (Dio) kaj Brahmanon (hindua pastro aŭ persono apartenanta al la brahmana kasto) oni skribas sammaniere, sed ofte oni uzas "brahmin'" por pastro.

368. La Bhikŝuo, kiu restadas en amema bonvoleco, kiu estas feliĉa en la Budha Dharmo, atingos la staton de paco kaj feliĉo, la paciĝon de ĉiuj kondiĉigitaj aferoj.
369. Malplenigu, ho Bhikŝuo, vian boaton : Malplenigite, vi veturos rapide. Fortranĉu pasion kaj malamon; al Nirvano vi pro tio iros.
370. Kvin fortranĉu³; kvin forlasu⁴; kvin aliajn evoluu⁵. La Bhikŝuo, kiu lasas la dek ligilojn malantaŭ si, estas nomata rivero-transiranto⁶.
371. Meditu, ho Bhikŝu! Ne estu malatentema. Ne permesu, ke via menso estu okupata de sens-plezuroj. Ne estu indiferenta kaj ne glutu pilkon de fero. Brulante, vi ne krii, "Ho, tio doloras!".
372. Ne ekzistas koncentriĝo en persono, al kiu mankas scio, nek scio en tiu, al kiu mankas koncentriĝo. [Sed] en kiu ambaŭ koncentriĝo kaj scio troviĝas, tiu vere estas proksima al Nirvano.
373. La monaĥo, kiu retiriĝis al soleca loko, kiu akiris pacon de menso, kaj kiu klare perceptas la Dharmon, spertas ĝojon, kiu superas la ĝojojn de [ordinaraj] homoj.
374. Kiam ajn li pensas pri la estiĝo kaj falo de la Skandhoj⁷, li spertas ĝojon kaj feliĉon. Al tiuj, kiuj scias, tiu pripensado estas la ekkono de la Senmorteco [Nirvano].
375. Kaj tio ĉi estas la komenco por saĝa Bhikŝuo: sensregado, kontenteco, sinreteno laŭ la regularo, asociiĝo kun noblaj kaj energiaj amikoj kies vivmanieroj estas puraj.
376. Li [la Bhikŝuo] estas bonvolema en siaj agoj kaj kulturita en sia konduto; plene ĝojante, li ĉesos suferi.
377. Same kiel la jasmens-liko forfaligas velkintajn florojn, vi, ho Bhikŝuo, devus entute forigi pasion kaj malamon.
378. La Bhikŝu', kies korpo, voĉo, kaj menso estas trankvilaj, kiu estas memdisciplinita kaj rifuzas la allogojn de la mondo, estas prave nomata paca.

³ La kvin ligiloj: memiluziigo, dubo, indulgo en ritoj kaj ceremonioj, sensdeziroj, kaj malamo.

⁴ Kvin aliaj ligiloj: ligiteco al la regno de formoj [niaj mondo kaj ĉieloj], ligiteco al la mondo de senformaĵoj [spirita mondo], malmodesteco, maltrankvilo, kaj nescio.

⁵ Konfido, atentemo, klopodo, meditado, kaj saĝeco.

⁶ La unua paŝo sur la Nobla Okparta Vojo.

⁷ La kvin grupoj, kiuj formas vivantan estaĵon.

379. Levu vin per vi mem. Per vi mem ekzamenu vin. Memprotektita kaj atentema, vi vivos feliĉe, ho Bhikŝu'.
380. Vere, la memo estas la sinjoro de la de la memo. Vere, la memo estas nia rifuĝejo; tial regu vian propran memon kiel [best-]komercisto regas noblan ĉevalon.
381. Plena de ĝojo, plena de konfido en la Instruo de la Budho, la Bhikŝu' atingas la pacan staton [Nirvanon], la ĉesigon de la kondiĉigitaj aferoj, kaj feliĉon.
382. Bhikŝuo, kiu, kvankam ankoraŭ juna, dediĉas sin al la Instruo de la Budho, briligos tiun ĉi mondon kiel la luno kiam libera de nuboj.

Ĉapitro 26

Brahmaṇa Vagga

La Brahmano

383. Strebu kaj tranĉu la riveron¹. Forigu, ho Brahmano, sensdezirojn. Konante la detruon de kondiĉigitaj aferoj, estu, ho Brahmano, scianto de la Ne-kreito².
384. Se la Brahmano atingas la du statojn³, ĉiuj katenoj forfalos de tiu kompreninto.
385. Al kiu ekzistas nek tiu, nek tiu ĉi bordo, nek ambaŭ — tiun, la senzorgan kaj senligan, mi nomas Brahmano.
386. Tiun, kiu estas meditema, senmakula kaj sola — tiun, kiu faris sian devon kaj estas liberiĝinta de koruptaĵoj — tiun, kiu atingis la plej altan celon⁴ — tiun mi nomas Brahmano.
387. La suno brilas dum la tago; la luno brilas dum la nokto. Armite brilas la militista reĝo; meditante brilas la Brahmano. Sed dum tago kaj nokto brilas la Budho en gloro⁵.
388. Ĉar li forigis malbonon, li estas nomata Brahmano. Ĉar li vivas en paco, li estas nomata Samano. Ĉar li rezignis malpuriĝon, li estas nomata ermito.
389. Oni devus ne bati Brahmanon, nek devus Brahmano [insulti] iun, kiu batis lin. Hontu al tiu, kiu batas Brahmanon! Pli grande hontu al tiu, kiu insultas atakanton.
390. Ne estas je malgranda merito se Brahmano sin retenas de venĝo. Se la menso estas puriĝinta de karaj objektoj, kaj kiam ajn la intenco vundi aliulojn ĉesos, tiam kaj nur tiam ĉesos la suferado.
391. Tiun, kiu ne faras malbonon per la korpo, parolo, aŭ menso, kaj kiu retenas sin laŭ tiuj tri manieroj, tiun mi nomas Brahmano.

¹ La pasiojn.

² La Nirvano.

³ Paco de menso kaj envido.

⁴ Nirvanon

⁵ Tiu ĉi verso estas aldonaĵo de Sariputo, la deklaminto de la Dhammapado.

392. Se oni lernas de iu ajn persono komprenon pri la Dharmo, kiel ĝi estis predikata de la Budho, oni devus pie riverenci tiun, same kiel Brahmano riverencas la sanktan fajron⁶.
393. Ne pro karbuklita hararo, nek pro familio, nek pro naskiĝo oni fariĝas Brahmano. Sed tiu, en kiu troviĝas ambaŭ vero kaj justeco, tiu estas pura; tiu estas Brahmano.
394. Je kia utilo estas via karbuklita hararo, ho sensprita viro? Je kia utilo via antilop-felo? Interne vi estas plena de pasioj; ekstere vi ornamigās.
395. Viron, kiu estas vestita en ĉifonoj, kiu estas maldika, kies vejnoj elstaras kaj kiu sola meditas en ĝangalo, mi noma Brahmano⁷.
396. Mi ne nomas lin Brahmano ĉar li naskiĝis de brahmana patrino. Tiun, kiu estas libera de obstakloj kaj libera de ĉiuj ligiloj, mi nomas Brahmano⁸.
397. Tiun, kiu tranĉis ĉiujn ligilojn, kiu neniam tremas, kaj kiu estas preter ĉiuj katenoj kaj senliga, mi nomas Brahmano.
398. Tiun, kiu tratranĉis la rimenon, la laĉon, kaj la kordon, inklude la alpendigojn, kiu rompis la riglilon kaj estas vekiĝinta, mi nomas Brahmano⁹.
399. Tiun, kiu sen ĉagreniĝi toleras riproĉon, baton, kaj punon; kies forto estas toleremo kaj kies armeo estas pacienco; mi nomas Brahmano.
400. Tiun, kiu ne estas kolerema, sed humila, virta, libera de avido, kaj portanta sian lastan korpon¹⁰, mi nomas Brahmano.
401. Kiel akvo sur lotus-folio; kiel semo de sinapo sur la pinto de pinglo; tiun, kiu ne estas ligita al sensplezuroj, mi nomas Brahmano.

⁶ La sankta fajro ludas gravan rolon en la vedaj ritoj de la Brahmanoj. La fajro estas la videbla prezentigo de la dio Agni'.

⁷ Kvankam Budho kontraŭis ekstreman asketismon, li permesis "mildan" asketan vivadon.

⁸ La rimeno en tiu ĉi verso signifas malamon; la laco estas avido; la kordo reprezentas heretikajn doktrinojn; la alpendigoj estas latentaj tendencoj kaj la riglilo estas nescio.

⁹ Tiu, kiu atingis surteran Nirvanon, ne plu renaskiĝos; tiu portas sian lastan korpon.

¹⁰ La ŝarĝo de la Skandhoj.

402. Tiun, kiu en tiu ĉi mondo sukcesas detrui siajn suferojn, kiu flankenmetas sian ŝarĝon¹¹ kaj estas liberiĝinta, mi nomas Brahmano.
403. Tiun, kies scio estas profunda, kiu estas saĝa, kiu konas la pravan kaj la eraran vojojn kaj kiu atingis la plej altan celon, mi nomas Brahmano.
404. Tiun, kiu asociiĝas nek kun hejmuloj, nek kun senhejmuloj, sed kiu migras sola kaj sen loĝejo; tiun, kiu estas sen deziroj; tiun mi nomas Brahmano.
405. Tiun, kiu flankenmetis la bastonon en rilatoj kun aliaj estaĵoj, malfortaj aŭ fortaj, kaj kiu nek vundas nek mortigas, mi nomas Brahmano.
406. Tiun, kiu estas amikema inter malamikemaj homoj; tiun, kiu estas pacema inter perfortemaj homoj; kaj tiun, kiu estas senliga inter ligitaj homoj; tiun mi nomas Brahmano.
407. Tiun, en kiu pasio, fiero, kaj konfuzo forfalis same kiel sinap-semo de sur la pinto de pinglo, mi nomas Brahmano.
408. Tiun, kiu uzas ĝentilajn, instruantajn, verajn vortojn, kaj kiu nenion ofendas, mi nomas Brahmano.
409. Tiun, kiu en tiu ĉi mondo prenas nenion nedonitan, ĉu longan ĉu mallongan, ĉu malgrandan ĉu grandan, ĉu belan ĉu malbelan, mi nomas Brahmano.
410. Tiun, kiu ne havas deziron, nek rilate al tiu ĉi mondo, nek rilate al la sekvonta mondo — kiu estas entute sendezira kaj liberiĝinta — mi nomas Brahmano.
411. Tiun, kiu ne havas sopirojn; tiun, kiu pro scio estas libera de duboj; tiun, kiu gajnis firman pozicion en la Senmorteco — tiun mi nomas Brahmano.
412. Tiun, kiu transcendis kaj bonon kaj malbonon, kaj ankaŭ la ligilojn — kiu estas sensufera, senmakula, kaj pura — mi nomas Brahmano.

¹¹ La vojon al feliĉa stato kaj la vojon al malfeliĉa stato.

413. Tiun, kiu brilas kiel la luno; tiun, kiu estas pura, serioza, kaj nekonfuzita; tiun, kiu detruis pasion al estiĝo¹² — tiun mi nomas Brahmano.
414. Tiun, kiu paŝis malantaŭ tiu ĉi marĉejo, la malfacila vojo, oceano de la vivo, kaj iluzio, kaj kiu transpaŝis kaj iris malantaŭen; kiu estas meditema, kaj libera de avido kaj duboj; kiu estas ligita al nenio, kaj atingis Nirvanon — tiun mi nomas Brahmano.
415. Tiun, kiu en tiu ĉi mondo liberiĝis de sensdeziroj, kiu rezignas hejman vivadon kaj fariĝas senhejmulo, kiu jam detruis sensdezirojn kaj estiĝon, mi nomas Brahmano.
416. Tiun, kiu en tiu ĉi mondo forigas avidon, rezignas mondan vivadon, kaj iras en senhejmecon — kiu detruis avidon kaj estiĝon — mi nomas Brahmano.
417. Tiun, kiu forĵetas homajn ligilojn kaj transcendas ĉielajn ligilojn — kiu estas entute liberiĝinta de ĉiuj ligiloj — mi nomas Brahmano.
418. Tiun, kiu forlasis ŝaton kaj malŝaton, kiu paciĝis kaj estas sen makuloj, kiu venkis la mondon kaj estas energia, mi nomas Brahmano.
419. Tiun, kiu en ĉiu rilato konas la morton kaj renaskiĝon de estaĵoj, kiu estas senliga kaj enlumigita, mi nomas Brahmano.
420. Tiun, kies destinton nek dioj nek anĝeloj nek homoj konas; kiu detruis ĉiujn koruptaĵojn kaj estas Arahato — tiun mi nomas Brahmano.
421. Tiun, kiu ne estas ligita al la Skhandoj, kiuj estis en la pasinteco, estas en la nuno, aŭ estos en la estonteco; tiun, kiu estas entute libera de katenoj kaj sopiroj — tiun mi nomas Brahmano.
422. La kompatulon, la noblulon, la heroon, la grandan saĝulon, la venkinton, la sendeziran, la puran, la enlumigitan — tiun mi nomas Brahmano.

¹² Al renaskiĝo. Budhano konfirmas, ke renaskiĝo estas fakto, sed li ne deziras ĝin — almenaŭ ne la serioza monaĥo, kies spirita strebado devus esti al la fino de renaskiĝoj. Nur tiuj sanktuloj, kiuj volas helpi aliulojn paŝi sur la Nobla Okparta Vojo kondukanta al Nirvano, libervole prokrastas sian propran finfinan Nirvanon ĝis kiam ĉiuj estos trovintaj liberiĝon. Tiaj kompatemuloj estas nomataj Bodhisatvoj (sanskrite Bodhisattva; en Pali, Bodhisatta); laŭ Mahajana Budhismo, Bodhisatvoj estas estontaj Budhoj en tiu ĉi aŭ ia ajn alia mondo.

423. La saĝulon, kiu konas la pasintajn vivojn kaj vidas benitajn kaj malbenitajn statojn; kiu atingis la finon de renaskiĝoj; kiu per supera scio perfektigis; kiu vivis la noblan vivon kaj atingis la finon de la pasioj — tiun mi nomas Brahmano.